IPR
INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Driemaandelijks tijdschrift
Afgiftekantoor: Antwerpen X. ISSN 1013-2031

Jarkolekto 37 - trimonata
07/2

Redakta komitato:
Iozefo Németh (red.)
Luiza Oberrauch Madella
Rob Moerbeek
Iwona Kocieba

Kunlaborantoj de la aktuala numero:
Siv Burell
Filomena Canzano
Aida Cizikaite
Gediminas Degesys
Alain Delmotte
Irina Goncarova
Zsofia Korody
Katalin Kovats
Marta Kovacs
Geza Kurucz
Hokan Lundberg
Maria Majerczak
Atilio Orellana Rojas
Radojica Petrovic
Arlette Plutniak
Venkatesh Reddy
Joseo Tenorjo
Mihai Trifoi
Wu Guojiang





ilei
Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

ENHAVO

Instrukapabligo – Ekzamenoj – Trejnkursoj (Zsófia KÓRÓDY) 4
Estrara raporto 2006 (Kompilis: Radojica PETROVIĆ) 9
Internacia Rajtigita Ekzamenantaro (IRE, stato 31.03.2007) 13
Instrukapabligo: trejnseminario *Flugiloj de malfacila vento* (Zs. KÓRÓDY) 14
La 1-a trejnado „Gvidu la 'Flugilojn'!" (Irina GONČAROVA) 15
Forumo pri la Komuna Eŭropa Referenckadro (Márta KOVÁCS) 17
Ĉu eterna Babelo aŭ ekzistas eliro? (Géza KURUCZ) 20
Alain DELMOTTE – Arlette PLUTNIAK: *Artoŝoko en Louvain-la-Neuve* 24
Gajnu someran feriaron en la koro de Germanio 27
El la landoj kaj sekcioj [AT, IN, BR, CN, FI, FR, IT, LT, PL, SE] 28
Nova instrukompleto de Stano Marček (recenzo) (Radojica PETROVIĆ) 33
La 40-a Konferenco de ILEI en 2007 Japanio (kompletigaj informoj) 34
La 41-a Konferenco de ILEI en 2008 Benino 37
ILEI-Konferenco en via lando (alvoko por 2009) 38

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Radojica Petrović, *Bul. oslobodjenja 36/14, 32000 Čačak, Serbio. Tel. (+381 32) 371053. Fakso: (+381 32) 342101, <radp@ptt.yu>.* Kunordigado, eksteraj rilatoj, la projekto InterKulturo.

Vicprezidanto: Zsófia Kóródy, *Esperanto-Centro, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg/Harz, Germanio. Tel./fakso (+49) 5521-5983. <zsofia.korody@esperanto.de>* Instrukapabligado kaj edukaj centroj.

Sekretario: Atilio Orellana Rojas, *Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando. Tel. (+31 70) 3556677, fakso: (+31 70) 358 4422, <atilioorellanarojas@gmail.com>*

Estrarano pri financoj: Sjoerd Bosga, *Tråddragargatan 27D, SE-723 37 Västerås, Svedio. Tel. (+46 21) 41 70 45, <sjoerd@esperanto.se>.* Administra sistemo.

Vicsekretario: Mihai Trifoi, *Str. Principala Bl.1 Ap.3, RO-527116 Bixad/Jud. Covasna, Rumanio (+40) 267-365319, <trifoi@honoris.ro>.* Lerneja agado.

Estrarano: Aida Čižikaitė, *Kapinių 11-15, LT-50189 Kaunas, Litovio. Tel. (+370) 37 793408. <aidute@mail.lt>.* Konferencoj. Scienca agado.

Estrarano: Yas Kawamura, *13-8 Nakayata-cho Babanomizo Kameoka-si, Kyoto-fu, JP-621-0855, Japanio,<esperanto@d0y0b.com>.* Azia agado.

Titolpaĝe supre: *Artoŝoko en Louvain-la-Neuve, Belgio (vd. p.24);*
malsupre: *Ekzamenprepara seminariserio en Stokholmo, Svedio (vd. p.32.)*

Scienca Komitato

***Prezidanto*: Humphrey Tonkin**, Usono, University of Hartford; AdE[1]

***Vicprezidanto*: Detlev Blanke**, Germanio, Prezidanto de la Societo pri Interlingvistiko

***Membroj*:**

Vera Barandovská-Frank, Germanio, Universität Paderborn, AIS[2] San Marino

Duncan Charters, Usono, Principia College, Elsah

Renato Corsetti, Italio, Università degli Studi di Roma "La Sapienza"; AdE[1]

Probal Dasgupta, Barato, University of Hyderabad; AdE[1]

Michel Duc Goninaz, Francio, Université de Provence; AdE[1]

Aloyzas Gudavičius, Litovio, Šiaulių universitetas

Wim Jansen, Nederlando, Universiteit van Amsterdam

Boris Kolker, Usono, AdE[1]

Ilona Koutny, Pollando/Hungario, Uniwersytet im. Adama Mickiewicza w Poznaniu; AdE[1]

Mauro La Torre, Italio, Università degli Studi Roma Tre

Maria Majerczak, Pollando, Uniwersytet Jagielloński w Krakowie

Geraldo Mattos, Brazilo, Federacia Universitato de Paranao; AdE[1]

Aleksandr Melnikov, Rusio, Академия Сельскохозяйственного Машиностроения

Radojica Petrović, Serbio, Univerzitet u Kragujevcu

Balázs Wacha, Hungario, Magyar Tudományos Akadémia, Nyelvtudományi Intézet

Sekretario: **Aida Čižikaitė**, Litovio, estrarano de ILEI

[1] AdE – Akademio de Esperanto

[2] AIS – Akademio de la Sciencoj, San Marino

Karaj Legantoj!

En apuda kolumno vi vidas la konsiston de Scienca Komitato por IPR – estas listigitaj nomoj de famaj esperantistoj, sed ili famas ne nur en Esperantio – ili estas bone konataj ankaŭ ekstermovade kiel fakuloj de siaj terenoj. Tiu grupo de homoj estas arigita ne hazarde – IPR estas ne nur movada, sed ankaŭ faka revuo, kiu celas prezenti ne nur gravajn eventojn de nia movado, interesajn renkontiĝojn, kie kaj kiu bone instruas, gajnante novajn adeptojn de nia lingvo. Instruistoj kaj instruemuloj prave serĉas fakajn, sciencajn artikolojn, materialon bezonatan por sia laboro kaj plialtigo de sia profesia kvalifiko en la revuo.

Pro tio mi invitas ĉiujn legantojn de la revuo pli kontribui per faka materialo, kiu estas recenzata de nia elstara SK. Tiamaniere ni povas altiri atenton ankaŭ de ekstermovadaj kolegoj kaj montri, ke Esperanto estas valora lingvo ankaŭ en faka kaj scienca agado.

Ni jam starigas bonajn kontaktojn kun loka akademia medio dum ILEI-konferencoj kaj precipe per ties Simpozioj laŭ konferenca temo.

Estas planata la eldono de Simpozaj prelegoj de 2005 (Kaunas) kaj 2006 (Parma). Do, bonan laboran kaj kunlaboron en nia movado kaj nia revuo.

Amike:
Aida Čižikaitė

Kion oni atendas de sinprezentado de ILEI-vicprezidanto?



Eble personan aŭ fakan vivresumon? Mi pensas, ke estas pli interesaj la farendaĵoj, la rolo, kiun tiu funkcio postulas de la komisiito kaj la fareblaĵoj en la estonto. Kompreneble oni povus resumi la laboron jam faritan por la instruado de nia ŝatata internacia lingvo E-o, la atingaĵojn, la rezultojn. Sed nia tasko estas rigardi antaŭen, daŭre serĉi novajn vojojn al la disvastigo de la lingvo, serĉi vojojn al faka perfektiĝo, plibonigi niajn kapablojn por pli efika instruado, trovi novajn lernemulojn, trovi lokon por E-o en la lerneja sistemo, ktp.

Miaj ĉeftaskoj kiel estrarano estas ekkoni kaj helpi la agadon de jam funkciantaj E-centroj, prizorgi instrukapabligon, havi superrigardon pri ekzistantaj klerigformoj, ellabori novajn kadrojn kaj konsideri eblecojn, kiel kaj kie ni povas trejni novajn kolegojn?



Grupo de seminarianoj kun Zsófia Kóródy en Benino

Ofte ni forgesas, ke ILEI estas monda organizaĵo, kaj ni emas rigardi nian asocion tre eŭropece. Estas ĝojige por mi vidi la novan tendencon ĉi-jare kaj en la sekva jaro: okazigi gravajn instruistajn kunvenojn, seminariojn, ILEI-konferencon en aliaj kontinentoj, nun en Azio (Japanio, 2007) kaj poste en Afriko (Benino, 2008).
Agrabla tasko venis por mi: helpi la afrikan agadon de ILEI, do mi akceptis gvidi seminarion en Benino en februaro 2007 [*vd. la foton sur p.4*.].
Niaj afrikaj kolegoj havas malmulte da ŝanco partopreni niajn kutimajn fakajn kunvenojn, sed ankaŭ por ili gravas havi fakan spertiĝon, kontakti gekolegojn, lerni kaj interŝanĝi ideojn. Unu el la celoj de tiu trejnado estis doni gramatikan, metodikan, organizan helpon al agademaj kolegoj venantaj ankaŭ el la najbaraj afrikaj landoj. Dum mallonga tempo estis traktataj multaj temoj, sed ili ne nur ricevis sciojn, sed mem kontribuis al la programo per prezentadoj de siaj devenlandaj lingvoj kaj kulturoj.
Mi certas, ke ĉiuj partoprenintoj kunportis multon utilan por sukcesa lingva ekzameno kaj por efika organizado de ILEI-konferenco en 2008. Mi ŝatus ankaŭ ĉi tie gratuli la perfektiĝemajn kolegojn, sed ni devas ankaŭ estonte zorgi pri ilia konstanta helpo, ja estas heroa entrepreno instrui E-on tie, kie granda entuziasmo estas bezonata por superi la malfacilaĵojn de la lokaj vivkondiĉoj.

Kiuj aliaj ĉefaj farendaĵoj estas antaŭ ni?
La nova ILEI-estraro kaj UEA-reprezentantino *Claude Nourmont* akceptis mian inviton al Herzberg, la E-urbo kaj kunsidis en novembro 2006 por pripensi venontajn agadojn, decidi pri kelkaj realigotaj celoj dum la venontaj jaroj [*vd. la foton sur p.6*!]. Tiu kunveno bone subtenis ankaŭ la laboron de la lokaj esperantistoj, E-instruistoj, ĉar dum akcepto en la urbodomo la ĉeestantaj politikistoj informiĝis pri la agado kaj forto de nia internacia fakorganizo.
Kaj jen kelkaj punktoj, kiuj rilatas al mia agado, taskaro en la estraro de ILEI:
Por havi kapablajn instruistojn, unue ni devas rigardi, kiujn ni havas por niaj celoj, do la unua pripensenda afero estas la kvanto.
Membronombro: se ni rigardas la nombron de esperantistaj kolegoj kaj la nombron de niaj landaj asocioj, ni ne povas esti kontentaj. Ĉu niaj servoj al la membroj estas kontentigaj? Ĉu ni varbas sufiĉe? Kie ni varbu? Ĉu inter la jam E-on parolantaj nefakuloj aŭ inter la fakuloj, gekolegoj ankoraŭ ne

parolantaj E-on? Kiel ni povas helpi tiujn, kiuj ne povas pagi sian membrokotizon?



La ILEI-estraro akceptita de la urbestro de Herzberg, la E-urbo

Ĉu vi, kara leganto iam ajn kontribuis al la *Koleghelpa Kaso* por membrigi nepagipovan kolegon aŭ helpi iun partopreni klerigkurson, seminarion aŭ konferencon? Se ni jam havos niajn klientojn, ni povas konsideri la sekvan paŝon, t.e. trejni ilin.

Instrukapabligo: Kiel iu povas fariĝi kursestro, E-instruanto, diplomita instruisto? Ni povas ĝoji, fieri, kaj danki al la gekolegoj, se E-o trovas sian lokon ie en ŝtata eduksistemo. Bedaŭrinde ni devas akcepti, ke nur en malmultaj landoj estas en iu formo oficiale agnoskita klerigvojo por akiri atestilon pri E-instruado. Eĉ se estas, ne ĉiuj el ni povas investi la bezonatan tempon kaj monon por universitata, altlerneja studado. Sed ni ŝatas postuli, ke la ekstermovada mondo akceptu nian lingvon, nian poresperantan agadon egalranga, egalrajta al tiu por aliaj fremdaj lingvoj, ni kiel E-instruistoj ricevu la saman prijuĝon. Sekve, manke de ŝtate agnoskita klerigado restas la tasko por ILEI zorgi pri tio kaj oferti taŭgan fakan trejnadon. Nun ankoraŭ mankas unueca sistemo, postularo por servi per tio

nian lerneman membraron. Estis jam pluraj strebadoj ellabori ekzamenon superagradan, sed sen montri la klerigpaŝojn akiritiun altnivelan ŝtupon. Ni devas esti pretaj liveri al la mondo instrukapablajn esperantistajn fakulojn. La konstanta kaj altnivela trejnado kaj klerigado tre gravas. La kunligiteco de instrukapabligo kaj ekzamenoj kompreneble donas al mi kromtaskojn, kaj mi estas dankema al la kolegoj, komisiitoj, kiuj helpas plenumi ilin.

Ekzamenoj: Por tiu supre menciita egalrajteco ni devas ankaŭ alstrebi en la nuna mondo la oficialajn lingvoekzamenojn laŭ la ses normigaj niveloj de la Komuna Eŭropa Referenckadro. Esperantaj ekzamendokumentoj egalrajtaj al aliaj fremdlingvoj certe helpas por multaj celoj. Farinte la necesajn antaŭpaŝojn, UEA/ILEI havas nun bonajn ŝancojn akiri akredititan lingvoekzamensistemon. Kompreneble ni devas zorgi poste ankaŭ pri la faka preparado, klerigado de la ekzamenkomisiitoj, do tio estos nova brančo en la trejnsistemo de nia mondorganizaĵo.

Trejnkursoj: La trejnado de E-instruistoj kaj instruantoj devas esti garantiata je daŭro eĉ eksteruniversitate. La klerigejo en Germanio, Interkultura Centro Herzberg (ICH), donas sian fakan helpon por tio. Komisiite de ILEI ni strebas ellabori taŭgan modelon laŭ la klerigsesia sistemo de Germana E-Centro (GEC), kiu sukcese plenumas sian taskon jam de pluraj jaroj. La laŭŝtupa evoluo de tiu internacia kurs- kaj klerigejo okazas per celkonscia planado. Internacie konataj fakuloj helpas la kleriglaboron per prelegoj, konsiloj, fakaj materialoj. Estas bona koincido, ke abunda fakliteraturo, vidbendoj, diversspecaj instrumaterialoj ekzistas surloke en tutjare uzebla, bone ordigita biblioteko kaj gazetarkivo. Tio estas granda avantaĝo por la lernemuloj, ĉar faklibroj raras kaj estas ofte vere multekostaj. Surloke oni povas legi, studi kaj kopii en la teknike bone ekipitaj salonoj. La klerigsesioj okazas regule, ĉ. dumonate, la instrufakoj enhavas ekzemple la sekvajn temojn: historio, interlingvistiko, literaturo, metodiko, varbado, kulturo, gramatiko de E-o.
Krom tiuj semajnfinaj studsesioj en 2007 (*www.ic-herzberg.de*) estas ofertataj ankaŭ unusemajnaj klerigperiodoj, do jen la du plej gravaj:

1) 29.06-06.07.2007: Metodika Semajno kun edukado.net (Katalin Kováts kaj Sylvain Lelarge)
Metodiko en la praktiko. Internacia Metodika Semajno en Herzberg am Harz, la E-urbo – 29.06-06.07.2007 (aŭ nur 29.06-01.07)

Temo: La stabo de la porinstruista retejo *www.edukado.net* prezentos sian metodologian programon kun la celo pliprofundigi la pedagogiajn kaj lingvoinstruajn lertojn kaj konojn de la interesatoj. Krom tio la partoprenontoj havos teorian kaj praktikan trejnadon pri kernaj demandoj de moderna lingvoinstruado; okupiĝos pri lingvopolitikaj demandoj kaj taksado laŭ la eŭropaj normoj; povos pruvi sian instruistan lerton per observado kaj prezento de lecioneroj. La trejnadon ni konsilas al praktikantaj instruantoj de E-o kaj klubgvidantoj.
Partopreno: La seminario daŭros unu semajnon, sed eblas aliĝi nur al la longa semajnfino (29 vendredo-01.07 dimanĉo) aŭ al tiu kaj la sekvaj pliprofundigaj tagoj.
Kotizo: 70 EUR por aliĝantoj ĝis 31.05.2007 kaj por ILEI, AGEI kaj GEA-membroj; 80 EUR (aliĝdato post 01.06.2007) kaj por ne-ILEI-membroj (15 EUR rabato por studentoj malpli ol 27-jaraj, kaj GEA-membroj). Nur-semajnfina partopreno eblas por 50%-oj de la kotizo.
Loĝado: aparte favorprezaj kondiĉoj por e-istoj en Herzberg (bv. mendi frue!): feriodomoj (min. 5-nokta restado kun samluantoj, sen matenmanĝo) ĉ.15-20 EUR, en hoteloj ekde 26 EUR/nokto/persono.
Aldonaj programeroj: E-projektsemajno en la loka gimnazio kun gimnazianoj (la lernojaro ankoraŭ daŭros!); Spectaculum (mezepok-stila urba festo en la historia kastelo); komuna ekskurso en la ĉirkaŭaĵo, Nacia Parko Harz kaj arbara rostadfesto kun lokaj e-istoj. Informoj, detaloj pri la urbo: *http://www.herzberg.de*, pri la loka organizanto: *http://ic-herzberg.de.*
Aliĝo (ankaŭ rete): *Interkultura Centro Herzberg, DE-37412 Herzberg am Harz, Grubenhagenstr. 6, Tel, faksilo: 0049-(0)5521-5983, <esperanto-zentrum@web.de>*

2) 28.09-03.10.2007. Oktobraj Pedagogiaj Tagoj (TORPEDO-3)
Landa Sekcio de ILEI (AGEI) alvokas al TORPED-o 3 en Herzberg
Fakkunsidoj, trejnkursoj: instruado, varbado, interreto.
Ĉeftemoj, invititaj prelegantoj, kursgvidantoj:

1. instrumaterialoj/helpiloj, uzo de modernaj iloj por efika instruado
2. trejnkurso por ekzamenantoj (*Gerald Tucker*, Germana E-Instituto)
3. vojo por fariĝi Cseh-instruisto (*Atilio Rojas*, Internacia E-Instituto)
4. modernaj programoj, komputilo por E-instruado (*Chuck Smith*)
5. publikaj rilatoj kaj publika varbado (*Carsten Mischke*)

Partoprenkotizo (semajnfina studprogramo): 30 EUR (por GEA kaj ILEI, AGEI membroj, ĝis 30a junio); 35 EUR (ĝis 31a aŭg.); 40 EUR (poste).

Por ne-membroj 5 EUR krompago, ĉiu posta tago 10 EUR (por membroj 9 EUR). Viajn preleg- kaj kontributemojn bv. anonci ĉe: *Zsófia Kóródy*.

Ekzamenoj en Germanio

1. GEA/GEI ekzamenoj okazos dum TORPED-o 3: B-ekzameno pri lingva kapableco, C-supera ekzameno pri lingva kapableco

2. UEA/ILEI ekzamenoj (elementa kaj meza niveloj) okazos dum IS en Würzburg, 27.12-03.01.2008. Bv. ĝustatempe anonci vin indikante la deziratan ekzamentipon kaj nivelon ĉe Interkultura Centro Herzberg.

Estrara raporto 2006

1. Instrukapabligado

1.1. Daŭre estas realigata la projekto „Flugiloj de malfacila vento" kunlabore kun TEJO kaj E@I. Nova iniciato por la plifortigo de la projekto estas „Gvidu la 'Flugilojn'" – por trejnado de novaj gvidantoj de seminarioj de „Flugiloj".

1.2. Kunlabore kun la Afrika Komisiono kaj Afrika Oficejo de UEA kaj kvar sekcioj de TEJO en Afriko estas realigata projekto „Instruistoj de E-o por Afriko".

1.3. En Interlingvistikaj Studoj de UAM en Poznań estas planata metodika fako en la tria studjaro kun subteno de ILEI.

1.4. Interkultura Centro Herzberg (ICH), Germanio, ofertas kursojn por pluklerigado de instruistoj. Interkonsente kun ILEI, dum la jaro 2007 ICH evoluigos kaj testos modulan (plurseminarian) sistemon de kapabligado de E-instruistoj.

2. Plia modernigo de lernado, instruado kaj ekzamenado de E-o

2.1. Neformala laborgrupo de IEK, ILEI, UEA kaj AdE kun forta kunlaboro de *edukado.net* starigis kontakton kun la Lingvopolitika Departemento de la Konsilio de Eŭropo kaj ricevis tradukpermeson por la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER) por Lingvoj: Lernado, Instruado kaj Taksado. Rezulte estis publikigita en E-o broŝuro pri KER entenanta la unuan ĉapitron, tabelon de la referencniveloj kaj memtaksilan normaron de KER.

2.2. Teamo el Sveda E-Instituto komencis kreadon de Eŭropa Lingva Dokumentujo (ELD) – Modelo por Esperantistoj.

2.3. Pluaj paŝoj estas planataj por evoluigi diversnivelajn ekzamenojn pri E-o laŭ la kriterioj kaj normoj de KER. Dume IEK prizorgas la ekzamenojn laŭ la ekzistanta sistemo.

2.4. ILEI daŭre subtenas klerigajn aranĝojn de siaj sekcioj kaj kunlaborantaj institucioj. Pri sia agado dum la jaro la sekcioj informadis tra IPR kaj retlistoj de ILEI. Estraranoj de ILEI partoprenis en realigado de ISLA-2006 (Internacia Somera Lernejo en Armenio, aparte grava por la plifortigo de ILEI-agado en la okcidenta kaj centra Azio), Pedagogiaj Tagoj de la ILEI-Sekcioj en Hungario kaj Nederlando, komencaj kaj progresigaj kursoj kaj metodika seminario en Danio kaj pedagogia seminario de Sveda E-Instituto.

2.5. Aliaj iniciatoj estas entreprenataj por enkonduko de E-o en lernejojn, inter kiuj elstaras Lingvolanĉilo (Springboard to languages) en Britio kun klopodoj disvastigi ĝin internacie, kaj lerneja kunlaborprojekto AKEL-2.

2.6. Notindas retprojektoj *lernu.net* kaj NESTO por elektronika lernado kaj *edukado.net* por subteno al instruado kaj lernado de E-o, kiujn ILEI morale subtenas.

3. Organiza plifortiĝo, tutmondiĝo kaj malfermiĝo

3.1. ILEI plifortigas sian agadon en Afriko kaj Azio. Per la Kolegheelpa Kaso estas subtenata plifortigo de sekcioj en malriĉaj landoj. La favora kotizkategorio kiu inkludas abonon al reta revuo anstataŭ la papera, praktike ebligis pluekziston de sekcioj en iuj malriĉaj landoj, ekzemple Rumanio kaj Albanio. Tamen restas la problemo de kelkaj malaktiviĝintaj sekcioj kaj reprezentantoj, precipe en malriĉaj landoj.

3.2. Per la projektoj „Flugiloj de malfacila vento" kaj „E-instruistoj por Afriko" kaj kunlabore kun TEJO kaj E@I, ILEI plijunigas sian membraron.

3.3. ILEI daŭre partoprenas en Unesko-agado kaj kunlaboras kun FIPLV. Reprezentantoj de ILEI partoprenis en tutmonda kongreso de FIPLV junie en Gotenburgo, Svedio.

3.4. Novaj formoj de malfermiĝo estas evoluigataj per la konferenca agado, precipe la dumkonferenca simpozio kiu plifaciligas kontakton kun la loka neesperantista medio, plejparte celante universitatan medion de la konferenclando.

4. Informado

4.1. Funkcias la retejo de ILEI kun pli-malpli akurate aktualigataj informoj el la ILEI-vivo.

4.2. *Internacia Pedagogia Revuo* (IPR) regule aperas kvar fojojn jare kiel faka revuo kaj organiza informilo. La materialoj de IPR legeblas ankaŭ rete en la rethejmo de ILEI.

4.3. La revuo por bazlernejanoj *Juna Amiko* (JA) daŭre aperas tri fojojn jare aperigante siajn materialojn ankaŭ rete en kunlaboro kun *lernu.net*. Laŭ decido de la Estraro de ILEI kaj interkonsento inter la redakcio de JA kaj teamo de la projekto „Lingvolanĉilo" la revuo estonte subtenos ĝin kaj publikigados materialojn el, pri kaj por la projekto. La samo povas validi por la projektoj FRINGOJ, AKEL kaj aliaj lernejaj E-projektoj.

5. Konferenco

5.1. La 39-a konferenco de ILEI okazis en julio 2006 en Parmo. Krom la tradicia konferenca programo stabiliĝis la novaj programeroj *Lingva festivalo* kaj *Simpozio pri la konferenca temo*. En la seminaria programo, krom la jam tradicia seminario de Interkulturo, unuafoje por ILEI-konferencanoj okazis seminario pri projektmastrumado.

5.2. En la jaro 2006 ILEI faris organizajn kaj antaŭpreparajn paŝojn por la konferencoj en 2007 (Ranzan, Japanio) kaj 2008 (Portonovo, Benino – la unua konferenco aŭ kongreso de iu tutmonda esperantista organizaĵo okazonta en Afriko).

5.3. La ILEI-estraro decidis lanĉi publikan konkurson por elekti organizantojn de estontaj konferencoj[1].

6. Scienca kaj universitata agado

6.1. Ekde la jaro 2006 funkcias Scienca Komitato de IPR kun la celo plialtigi la kvaliton de fakaj artikoloj en la revuo kaj plifortigi la motivojn por utiligado de E-o en la pedagogiaj sciencoj kaj praktiko.

6.2. La dumkonferenca simpozio montriĝis grava kaj utila por evoluigo de eksteraj kunlaborrilatoj de ILEI en la universitata medio

[1] La estraron jam nun kontaktis 3 landoj pri tiu konkurso.

kaj instigo al utiligado de E-o en scienca agado. Estas planata eldono de speciala kajero de IPR kun simpoziaj prelegoj.

6.3. ILEI havas plej proksimajn planojn komenci kunlaboron kun AIS kaj ISAE, kun kiuj estas diskutataj la formoj de kunlaboro.

7. Lerneja agado

La Lerneja komisiono de ILEI turnas la atenton al subteno kaj plifortigo de lernejaj projektoj kiaj estas: la brita projekto „Lingvolanĉilo", agado de la Internacia Laborgrupo „Lingvolanĉilo" kaj ĝia iniciato/projekto „Interkultura kaj multlingva dialogo per neŭtrala lingvo, inter la eŭropaj lernejoj", daŭrigo de la projekto AKEL-2 kaj revivigo de la projekto AKEL-1, subteno al la projektoj „Infanoj ĉirkaŭ la mondo" kaj „InterKulturo".

8. Internaciaj ekzamenoj de ILEI/UEA

8.1. Ekde aŭgusto 2006 oficas novelektita Internacia Ekzamena Komisiono (IEK) de ILEI/UEA. Krom organizado de ekzamensesio kaj preparado de ekzamenmaterialoj, la nova IEK faris paŝojn por renovigo kaj kompletigo de IRE (Internacia Rajtigita Ekzamenantaro), proponis plibonigojn de la Ekzamena regularo, aprobis sian Organizan Regularon kaj partoprenis en diskutoj pri la bezono modernigi la ekzamensistemon konforme al la Komuna Eŭropa Referenckadro por Lingvoj kaj Eŭropa Lingva Dokumentujo.

8.2. IEK poluris la tekston de la gvidilo pri la elementa kaj meza niveloj de la internaciaj ekzamenoj de ILEI/UEA, kaj restas la tasko definitivigi ĝin.

8.3. En la jaro 2006 okazis 4 sesioj de Internaciaj ekzamenoj: en St. Andreasberg (Germanio kadre de Printempa Seminario Internacia), en Florenco (Italio, kadre de UK), en Herzberg (Germanio) kaj en Dobrichovice (Ĉeĥio).

Kompilis: Radojica Petrović, prezidanto
Kontribuis: Mihai Trifoi, lerneja agado
Aida Čižikaitė, estrarano pri konferencoj kaj scienca agado
Probal Dasgupta, prezidanto de IEK

Internacia Rajtigita Ekzamenantaro (IRE)

31.03.2007

Argentino: ALANÍZ, Teresita Inés
Armenio: ARAKELJAN, Karine; ELBAKJAN, Araksja
Aùstralio: BISHOP, Jennifer
Barato: DASGUPTA, Probal
Benino: CODJO, Jean
Belgio: KOCIĘBA, Iwona; WITDOECKT. Flory
Brazilo: ANDRADE ALVES, Filho Aristóphio; PRISCOTIN MENDES, Neusa; VALLE, Fabricio
Britio: BOULTON, Marjorie; GUBBINS, Paul; WELLS, John
Bulgario: BOJAĜIEVA, Eva
Ĉeĥio: CHRDLE, Petro; MALOVEC, Miroslav
Ĉinio: HAN Zuwu; HU Guozhu; LI Weilun
Danio: KIRSCHSTEIN, Wolfgang
Ebura Bordo: DOUMEGNON, Koffi; KOUABLAN, Kouassi Antoine; YASSI, Ambroise
Francio: BAVANT, Marc; LO JACOMO François
Germanio: EMMERICH Andreas; FISCHER Rudolf; KÓRÓDY, Zsófia; KRONENBERGER, Albrecht; TRENNER, Sabine; WIBROW Dennis; ZILVAR Peter
Hispanio: CASQUERO DE LA CRUZ, Augusto; GIMÉNEZ GARCÍA, Juan A.; GUTIÉRREZ ADÚRIZ, Miguel; MARTIN, Pedro M.
Hungario: MACGILL, Stefan; NÉMETH József; SZILVÁSI László
Irano: TORABI, Reza; MAMDUHI Ahmad Reza; SAYADPOUR Keyhan
Italio: CORSETTI, Renato; DE LORENZI, Carla; OBERRAUCH MADELLA, Luigia
Japanio: KAWANISHI Tetsurou; KIKUSHIMA Kazuko (Krizantemo); SUZUKI Masumi
Kanado: FETTES, Mark; HOPKINS, Paul
Korea Respubliko: LEE Jung-kee; MA Young-tae; SO Jinsu
Kostariko: LEONI DE LEÓN, Jose Antonio
Kroatio: BELOŠEVIĆ, Marija; ŠTIMEC, Spomenka
Kubo: GUTIÉRREZ, Maritza; HERNÁNDEZ ANGULO, Julián; JIMÉNEZ BATISTA, Héctor
Madagaskaro: FIDILALAO, Henriel; RALALARISOA, Justine
Nederlando: BERVELING, Gerrit; DE VRIES Arjen-Sjoerd; HAVEMAN, Roel; JANSEN Wim; KOVÁTS, Katalin; LELARGE, Sylvain; MOERBEEK, Robert; ONEŢ, Ionel; ORELLANA ROJAS, Atilio
Pollando: KOUTNY, Ilona; MAJERCZAK, Maria

Rusio: MELNIKOV, Aleksandr
Serbio: PETROVIĆ, Radojica
Slovakio: NEMEC, Vladimir
Svedio: EMANUELSSON, Agneta; FORSMAN Lars; LINDBLOM Roland
Svislando: GACOND, Claude; GROSJEAN-ROBERT, Mireille; MOLNÁR Mónika; VON BUEREN Jean-Thierry
Tajvano: KHEIR-KHAH Reza
Togolando: AGBEMADON-ATTIOGBE, Mensah Biova; GBEGLO, Koffi; SAGBADJELOU, Kokou
Ukrainio: AUDERSKAJA, Tatjana; HORDIJENKO, Volodimir; DANILJUK Nina
Usono: BROZOVSKY, Joel; CHARTERS, Duncan; KOLKER, Boris; MAXEY, Bill; MILLER, Lee; SHLAFER, Aleksandr
Vjetnamio: NGUYEN Xuan Thu
Zimbabvo: MAZODZE, Oliver

Instrukapabligo: trejnseminario *Flugiloj de malfacila vento*

dum IS, Paderborn, Germanio 27.12.2006-03.01.2007

Ĉar la seminario *Flugiloj* dum IS 2005/2006 en Germanio pritraktis ĉefe la gramatikajn malfacilaĵojn de E-o, la nuna celis metodikon kaj metodikon en la praktiko. Laŭ la peto de la IS-organizantoj mi ellaboris lecionojn pri diversaj instrumetodoj, pri lerniloj kaj kursmaterialoj, praktikado de E-instruado, kursorganizado, ekzamenoj/pritaksado, ktp. aldonante personajn spertojn de pli ol 25-jara E-instruista laboro. La programo enhavis tri partojn kaj la seminario sekvis la jenan skemon:

Gramatiko – Lingva perfektigo: por instrui lingvon gravas mem profunde koni ĝin.

Teorio – Konsiloj por junaj instruemuloj, transdono kaj interŝanĝo de spertoj pri lingvoinstruado, diskutado pri metodoj/didaktiko/ekzercoj/ instrumaterialoj.

Praktikado – La partoprenantoj preparis materialojn, skizojn por antaŭe interkonsentita parto de leciono kaj gvidis lecionon, dum aliaj seminarianoj kun jam sperta instruanto observis la instruadon kaj filmis kelkajn partojn por posta rerigardo kaj analizo.

Tio estis io nova por *Flugiloj*, sed nepre rekomendinda, ja oni multe lernas farante kaj el propra provado.

La seminarion partoprenis naŭ personoj, sed bedaŭrinde neniu povis sufiĉe regule ĉeesti la serion de lecionoj – pro gravaj organizaj devoj kaj aliaj paralelaj programeroj.
Feliĉe ni povas oferti al la interesitoj daŭrigon, vizitadon de instrukapabligaj, metodikaj kursoj, seminarioj en Interkultura Centro Herzberg.
La jarprogramo por 2007 estas trovebla ĉe *http://ic-herzberg.de/* (*Programkalendaro*).
Aparte ĝojigis min la partopreno de ses kandidatoj en la t.n. „ekzameno pri lingva kapableco" (nivelo *B* en la ekzamensistemo de la 100-jara GEI, Germana E-Instituto.) Tio povas esti grava ŝtupo por kelkaj preparantaj sin al la trapaso de meza ekzameno de UEA/ILEI. Tion ni planas oferti dum IS 2007/2008 en Würzburg. Dankante al la organizantoj kaj aktivaj partoprenintoj de tiu seminario:

Zsófia Kóródy,
ILEI-estrarano pri instrukapabligo

LA 1-a TREJNADO „GVIDU LA 'FLUGILOJN'!"

La 27-31-an de decembro 2006 enkadre de la Ago-Semajno (AS-4) en Nowy Sącz (Pollando) okazis la 1-a Trejnado „Gvidu la 'Flugilojn'!", kies celo estis eduki junajn gvidantojn por la porinstruista seminario „Flugiloj de Malfacila Vento" (FMV). La trejnado estis gvidata de *Irina Gonĉarova*, kiel konsilanto pri administraj aferoj kontribuis *Peter Baláž*. Unufoje pri ILEI-projektoj kaj ties financado rakontis la ILEI-kasisto *Sjoerd Bosga*. Kiel trejnatoj partoprenis 6 personoj, po unu el Brazilo kaj Hispanio kaj 4 el Rusio. Tiuj estis gejunuloj kun pedagogia aŭ/kaj lingvistika klero, kun diversgranda instruista sperto, libere parolantaj en E-o kaj pretaj dediĉi sin por gvidado de la seminario „Flugiloj de Malfacila Vento" enkadre de eistaj aranĝoj. La laboro pasis dum 4 tagoj kaj konsistis el 4 poduhoraj sesioj. Estis traktitaj la sekvaj temoj: administrado de FMV, financaj konceptoj de la projekto „Flugigi la Flugilojn", partoprenantaro de FMV, kiu rajtas ricevi la Ateston de FMV, kiel kaj kion instrui dum FMV, planado de FMV-2007. Ĉio estas dokumentita kaj atingeblas rete. Dum la 3-a labortago la partoprenantoj demonstris antaŭ la kolegoj kaj interesiĝanta publiko po unu 15-minutan lecion-fragmenton. La sekvan tagon okazis analizo kaj taksado de tiu ĉi laboro. Oni traktis ankaŭ ĉies sukcesojn pri plenumado de administraj taskoj, ricevitaj kaj faritaj enkadre de „Gvidu-1" (protokolado,

verkado de instrukcioj, preparo de la publikaj elpaŝoj, kolektado de ILEI-kotizoj ktp.). Jam dum AS por la gvidantoj de „Flugiloj" unu el la studantoj funkciigis specialan dissendoliston.

La ĉefaj konkludoj de la komunaj pridiskutoj estis la jenaj:
„Flugiloj de Malfacila Vento" estu la seminario por instruemaj e-istoj de TEJO-aĝo, kun minimume mezlerneja klero kaj minimume meza E-lingva nivelo, kiu kontentige pasis la aliĝan antaŭtaksadon. La kvanto de la partoprenantoj estu inter 8 kaj 20 gejunuloj. Por atingi la Ateston la seminariano devas partopreni minimume 4 el inter la 6 lecionoj; montri teoriajn sciojn pri iuj metodikaj temoj; sukcesi pri la gramatika kontrolo; prezenti lecioneron; pagi ILEI-kotizon por la kuranta jaro.
„Flugiloj de Malfacila Vento" konsistu el 3 metodikaj kaj 3 gramatikaj poduhoraj eroj. La prioritata estu la metodika parto, tamen la gramatika restu, ĉar ankaŭ ĝi povas esti traktata de la metodika vidpunkto. Por la gramatika parto la gramatika gvidonto elektu el la 12 temoj, kiuj estis difinitaj. La nepraj programeroj de FMV en la metodika parto estu: skiza prezento de diversaj instrumetodoj; bazaj principoj de instruado; planado de la leciono; informo pri lerniloj, rimedoj, ret-ligoj.
Aliaj temoj, koncernantaj instruadon (varbado, organizado de E-kursoj, instruaj projektoj ktp) estu ekster FMV. De administra vidpunkto estis pridiskutitaj kaj priskribitaj ĉiuj paŝoj de la sukcesa FMV-organizado. Por realigi la seminarion bezonatas 3 funkciuloj: administranto, gvidanto de la metodika parto, gvidanto de gramatika parto. Ĉiu partopreninto de „Gvidu" estis trejnita kiel administranto kaj ĉiu difinis sian gvidotan terenon kiel metodikisto aŭ gramatikisto. La koncerna Ateston ricevis ĉiuj partoprenantoj de la „Gvidu-1". Pri metodiko kaj administrado: *Xose Conde Llinars, Gonĉarova Svetlana, Osincev Aleksandr, Sakaeva Diana* kaj *Leandro Souza Moreira*; pri gramatiko kaj administrado: *Grustnev Kirill*.
Malgraŭ tio, ke ĉiuj 6 „Gvidu"-partoprenintoj esprimis deziron jam en la jaro 2007 praktiki gvidadon de FMV, oni venis al la konkludo, ke bezonatas ankaŭ praktika staĝado ĉe spertaj FMV-gvidantoj. Tiu staĝado okazos somere de 2007 dum Eŭropa Esperanta Kongreso en Maribor (Slovenio), kiu jam invitis la „Flugilojn" en sian programon.
Por la seminario „Flugiloj de Malfacila Vento" estis rekomenditaj la amasaj E-aranĝoj: EEK (junulara programo), IJK, IJS (Hungario), IS (Germanio), IJF (Italio), SEJT (Rusio) kaj ajna amasa E-aranĝo, kiu invitos FMV kaj pretos kunsolvi ties organizajn taskojn. La lastaj inkludas ankaŭ financan

kompenson de loĝado kaj manĝado por 2 FMV-gvidantoj; povas okazi iuj kromaj financaj interkonsentoj, ekzemple, pri parta financado de la staĝantoj. La 1-a trejnado „Gvidu la 'Flugilojn'!" pasis sukcese. Se troviĝos partoprenantoj, ĝi povos okazi dum ASo ankaŭ ĉi-jare.

Irina Gonĉarova (Rusio), gvidanto de la trejnado

Forumo pri la Komuna Eŭropa Referenckadro

En *Eŭropa Unio* la membroŝtatoj havas memstaran instrupolitikon, sed estas neevitebla politika kaj praktika bezono „harmoniigi" ankaŭ ĉi-terene la agadon de la membroŝtatoj. Deklarita valoro por ili estas la plurlingveco, t.e. principe neniu lingvo rajtas superregi la aliajn unuflanke, aliflanke la diversaj edukaj sistemoj devas ebligi al la civitanoj iĝi plurlingvaj. La moveco de la civitanoj necesigas krom la kono de diversaj lingvoj ankaŭ la komparon de diversaj diplomoj, atestiloj – nivelojn de lingvokono.

El tiuj necesoj naskiĝis en 2001 la *Komuna Eŭropa Referenckadro* (KER) de la *Konsilio de Eŭropo*. Ses jarojn post ĝia publikigo venis la tempo trarigardi, kiujn efikojn ĝi havis je la diversaj rolantoj de la edukado.


La sukceso de KER estas grandega: la eŭropaj landoj diversgrade- kaj tempe adaptis diversajn erojn de la edukaj sistemoj al ĝi. Ĝi plej vaste uzatas en la taksado: en la ekzamenoj ĉe la fino de mezgradaj studoj, sendependaj lingvaj ekzamenoj, *Eŭropa Lingva Dokumentujo*. Same gravan rolon ĝi havas dum la ellaborado de instruprogramoj pri lingvoj.

Kiel la nomo mem montras, ĝi volas esti kadro, kaj ne deviga normo. Unu el la ĉefaj demandoj estas, vidante ĝian popularecon, ĉu oni sukcesos respekti tiun econ, aŭ ĝia uzo kondukos al uniformiĝo en la instruado de lingvoj. Alia problemo restas ĝia apliko ekzemple en la ĉiutaga pritaksa praktiko, ja en la eŭropa lerneja kulturo tre profundan tradicion havas la taksado per notoj. Al tiu interregistara forumo estis invititaj kelkaj neregistaraj organizoj, inter ili UEA/ILEI. Tiu partopreno donis novajn spertojn kaj kontaktojn por la estontaj tiuterenaj kunlaboroj kaj projektoj, pri kiuj la laborgrupo de UEA kaj ILEI estas plu laboranta.

La artikolon vi povas elŝuti en la *Legejo* de *www.edukado.net*: serĉu la temon *Eŭropa Lingva Dokumentujo* aŭ entajpu *http://www.edukado.net/pagina/Legejo/149//#691*.

Márta Kovács, <bdg.kovacs.marta@gmail.com>

La eduka lingvopolitiko de la Konsilio de Eŭropo[2]



Pri la eduka lingvopolitiko de la *Konsilio de Eŭropo* laboras du centroj: la *Lingva Departemento de la Konsilio de Eŭropo* en Strasburgo (Francio) okupiĝas ĉefe pri teorio kaj la *Eŭropa Centro de Modernaj Lingvoj* en Graz (Aŭstrio) pri la apliko.

La **Lingva Departemento de la Konsilio de Eŭropo**[3] estras programojn de interregistara kunlaboro, la ĉefaj projektoj celas ellabori edukan lingvopolitikon kun speciala akcento pri la:

[2] *www.coe.int*
[3] *www.coe.int/lang*

- plurlingveco;
- komunaj eŭropaj referencnormoj pri lingvokono;
- rajtoj kaj respondecoj en la instruado de lingvoj.

La programoj de la *Departemento* rezultigis plurajn rekomendojn kaj rezoluciojn de la *Komitato de Ministroj* kaj *Parlamenta Asembleo de la Konsilio de Eŭropo*.

Inter la projektoj de la *Lingva Departemento* estas/os vaste konataj:
– la **Eŭropa Jaro de la Lingvoj** (organizita kun Eŭropa Komisiono en 2001) kaj la **Eŭropa Tago de Lingvoj**[4]
– la Komuna Eŭropa Referenckadro (**KER**) kaj Eŭropa Lingva Dokumentujo (**ELD**)[5] (por priskribi lingvajn kompetencojn kaj proponi komunajn eŭropajn referencnormojn en la lingvoinstruado (*vd. pli detale en IPR kaj IPR 1/07*.[6])
– **Biografio de interkulturaj renkontiĝoj** estas nun ellaborata.

Krome ekzistas 2 gravaj programoj kiuj koncernas ĉefe lingvopolitikistojn:
– De la lingva diverseco al la plurlingva instruado: *Gvidilo por la ellaborado de eduka lingvopolitiko en Eŭropo* en kies kadro la *Konsilio de Eŭropo* proponas helpon je 3 niveloj (ŝtato, regiono, urbo), koncerne ĉiuspecajn lingvojn (nacia/oficiala aŭ fremda aŭ minoritata aŭ migrula) por ellabori **Profilo**n pri eduka lingvopolitiko.
– Lingvopolitiko serve al la demokratia civitaneco kaj socia inserto (2006-2009), kiu koncentriĝos je la lerneja lingvo (lingvo kiel studobjekto, lingvo kiel ilo de la instruado kaj lernado de la aliaj stud-

La plurlingva edukado kuraĝigas:
- la konsciiĝon pri la kialo kaj kielo en la lernado de la elektitaj lingvoj
- la konsciiĝon pri la transigeblaj kompetentecoj kaj pri la reutiligeblaj lingvolernaj kapabloj
- la respekton de aliula plurlingveco kaj la rekonon de lingvoj kaj lingvaj variantoj, sendepende de ilia bildo en la socio
- la respekton de la kulturoj esence ligitaj al lingvoj kaj de aliula lingva identeco
- la kapablon percepti kaj apliki la ligon inter lingvoj kaj kulturoj
- la ĝeneralan integran aliron de la lingvoinstruado en la instruprogramoj

[4] *www.coe.int/jel*
[5] *www.coe.int/portfolio*
[6] por pliaj informoj en E-o: *www.edukado.net*

objektoj, la eblaj konverĝoj inter la lerneja(j) lingvo(j) kaj modernaj ('fremdaj') lingvoj kaj ĉiu(j) alia(j) lingvo(j) de la lernanto). La Departemento proponas helpon al la ellaborado de edukpolitiko ankaŭ pri minoritatoj respektive plenkreskaj enmigrintoj.

La **Eŭropa Centro de Modernaj Lingvoj**[7] (ECML) celas la praktikan aplikon de la lingvopolitiko, promociante la novigojn en la lernado kaj instruado de modernaj lingvoj, tra la klerigado de multiplikistoj fare de esplorprojektoj ligitaj al ĝia programo.

La titolo de ĝia tria mezlonga programo (2008-2011) estas: **Valorigo de lingvaj profesiuloj: kompetentecoj – retoj – efikeco – kvalito**.

Ĝi kovros kvar temarojn: – *taksado;*
– *kontinuo de lingvolernado;*
– *enhavoj kaj lingva edukado;*
– *plurlingva edukado*.

Oni atendas projektproponojn de edukaj lingvopolitikaj profesiuloj el la membroŝtatoj. La proponitaj projektoj devos alporti konkretan kaj novigan kontribuon al la instru- kaj lernpraktiko de lingvoj en Eŭropo, kontribui al la ĝeneralaj celoj de la programo, konformi kaj al la misio de la Centro kaj al la valoroj de la Konsilio de Eŭropo.

Ĉu eterna Babelo aŭ ekzistas eliro?[8]

Havas nenian sencon plue prokrastadi. Kiu ankoraŭ ne vidas, kio estis evidenta jam antaŭ jarcentoj, nome: trans lingvolimoj multlingveco kruele malhelpas liberajn interhomajn kontaktojn (kaj ho, kiom-foje oni profitis de lingva surdmuteco por misinformi alilingvulojn!), tiu ne povas racie prijuĝi la aferojn aŭ, simple, ne volas vidi la sekvojn, kiuj montriĝis en la pasinteco kaj kiuj nun centoble pli ofte aperas ĉiutage.

Kion, do, klare vidi, kompreni?

---

[7] *www.ecml.at*

[8] La originala artikolo verkiĝis hungare por la plej granda hungara taggazeto, sed oni ne aperigis ĝin. Eble vi povas traduki ĝin al via nacia lingvo kaj provi ĝian aperigon en aliaj, pli malfermitaj naciaj gazetoj de pli liberpensaj landoj. Sed antaŭ ol vi komencus la tradukadon, vizitu la Legejon de *www.edukado.net*, kie vi povas trovi la artikolon jam en 10 diversaj lingvoj: *http://www.edukado.net/pagina/Legejo /149/#18467 – NdlR*

La gepatra lingvo estas la plej grava portanto de la vivmaniero kaj kulturo de ĉiu popolo. Se lingvo malaperas, en relative mallonga tempo forgesiĝas grandparte, kelkfoje tute, la historio kaj kulturo de la koncerna etno. Evidente ĉiu popolo volas konservi sian lingvon, kies perdo egalas ja la pereon de la etno. El ĉio ĉi sekvas: se oni volas konservi la buntecon de kulturoj (ĉar ĉiu el ili estas parto kaj fonto de la tutmonda kulturo), tiukaze oni ne povas konstati ilian pereon kun „*sobra objektiveco*". Sciu, ke nuntempe pli ofte ol antaŭe malaperas malgrandaj lingvoj, kiuj konservas, pli ĝuste: konservis, spertojn kaj memorojn de forpasintaj jarmiloj. Kaj ni, eksteruloj – ĉar ni ankoraŭ ne sentas nin koncernataj – apenaŭ atentas pri ili, ja tiom da malnovaĵoj perdiĝas ĉirkaŭ ni, sekve ne pripensante sufiĉe ni opinias: tio estas evidenta sekvo de la progreso.

Mi petas vin, kara leganto, ne fariĝi tiel supermoderna, bonvolu iom mediti pri tio, ĉu ĉio evoluas en ĝusta direkto. Racia kontrolo neniam malutilas.

Unu konstato estas certa: la nuntempa komunikado ne similas eĉ tiun de la 19-a jarcento, eĉ por ne mencii la pli fruajn epokojn, kiam la individuo – krom kelkaj esceptuloj – vivis en preskaŭ plena izoleco. Male, hodiaŭ oni ne povas sin tiel kaŝi, ke ne altrudus sin ĉiuhore la vasta mondo. Tio ne estas sortobato, male, ni ĝoju pri tio, ke ni povas finfine trovi nian komunan trajton, identecon.

Kiel manifestiĝas la revolucia ŝanĝo en la komunikado, lingvouzo? La komunikiloj fariĝis multspecaj, rapidaj kaj preskaŭ kapablaj pensi. Sed kiel aliformiĝis la lingva komunikado, kiel tie prezentiĝas la ŝanĝoj? Tie okazis preskaŭ nenio. Ĉiam ankoraŭ dominas la sama principo, kiu regis antaŭ jarmiloj: por transnacia komunikado servas la lingvo de la ekonomia kaj politika grandpotenco aktuale plej forta. Neŭtrala ekstera observanto certe indignus – kaj li sendube pravus –, ke pere de internacia komunikado enspezas miliardojn ĝuste tiuj landoj, kiuj eĉ sen tio estas relative riĉaj (mi ne envias al ili) kaj la malpli sukcesaj elspezas miliardojn el siaj malriĉaj buĝetoj por esti kapablaj almenaŭ hontinde balbuti trans la landlimoj.

Kia egaleco estas tio? Nun, kun aparta atento necesas pensi ankaŭ pri la lingva egaleco, kiu surpapere jam delonge ekzistas, sed por kiu decida paŝo tiudirekta ĝis hodiaŭ ne okazis. Ni kondutas, kvazaŭ ne ekzistus alia solvo, kvazaŭ la tradicia „celkonforma" heredaĵo de jarmiloj estus la unusola irebla vojo.

Kia lingva egaleco estas tio, kiam iuj popolanoj devas lerni du-tri fremdajn lingvojn kaj, kompreneble, tiom ne sufiĉas (!), dum aliaj – kiel ekzemple Britio – ĉesigas la devigan instruadon de fremdaj lingvoj, ĉar por tio

nuntempe granda bezono ne montriĝas, ĉi-terene oni povas do ŝpari. Kaj praktike ili pravas. En la nuna sistemo ili facile prosperas, dum aliaj suferegas pro ĝi.

Kio estas antidemokratia en tiu ĉi interkomunikado? Tio, ke estas elektitaj unu-du, eble kelkaj naciaj lingvoj, sed ni tuj aldonu: ne pro lingvaj valoroj (laŭ tiu principo pluraj centoj el ili taŭgus!) kaj ili estas levitaj super la ceterajn, sekve ili estas tiel aŭ aliel altruditaj al alilingvaj nacioj. Altrudo mi konsideras ankaŭ, kiam iu memvole, kun ĝojo elektas iun lingvon, ĉar li konscias, ke sole tiel li povos plenumi la postulojn, kaj ke la elektita lingvo grave faciligos lian karieron.

Kial tiu ĉi vojo estas maljusta? Krom la supre menciita ekonomia malegaleco ĝi estas antidemokratia ankaŭ pro tio, ke la lingvo – estante portanto de la koncerna etna kulturo – plialtigas la rangon de la nacio, ĉar lingvo ne estas lernebla sen alproprigo de ties nacia kulturo. Kio ne estas konata, tio ne estas aprezata; kio estas konata, tio ĉiam estas por la individuo valora kaj utila. La instruado de fremdaj lingvoj grave kontribuas al nereala, iom falsa prezento de la tuthomara kulturo.

Kie troveblas do la solvo, se ĝis nun la historio ne alportis alian ekzemplon? Ĉu ekzistas, entute, demokratia solvo?

Feliĉe la homaro – almenaŭ ties fervore idealista parto – ĉiam rigardas antaŭen. De antaŭ jarcentoj ĝi serĉas eliron. Relative rapide ĉiu pensulo unuanime venis al konkludo, ke neniu nacia lingvo taŭgas por transnacia komunikado justa, la elektita lingvo akiras ja grandegan avantaĝon nejustan. Kaj, se taŭga lingvo ne ekzistas, necesas ĝin krei, diris ili ĉiuj. Tiel ekestis aro da artefaritaj lingvoj. Juĝante ilin per ĉi-epoka cerbo, oni trovas inter ili tre primitivajn kaj ankaŭ ege atentindajn.

Ĝenerale ĉiu radikala nova ideo estas renkontata, kvazaŭ tradicie, kun forta kontraŭstaro. Neŭtrala transnacia lingvo ne estas escepto. Multaj – kaj troviĝas inter ili alte respektataj personoj – deklaris, ke lingvo ne estas artefarebla. Tio en si mem estas absurdaĵo, ja ekzistas centoj da kontraŭaj ekzemploj, vidu la sennombrajn tiel nomatajn sekretajn, koditajn lingvojn, kies aŭtoroj estas vaste konataj, kaj krome, iu ajn el ni povas entrepreni tian taskon. Sciu, cetere, ke ĉiu lingvo, ŝajne spontane evoluanta, estas artefarita, modifata, korektata en certaj epokoj kun celkonscia intenco.

Kiel ĉiam, inter eksperimentoj aperas kreaĵo, prezentanta plej taŭgan solvon, kaj krom tio, ni trovas nin en favora situacio, t.e. ni jam posedas lingvon, kiu dum la pasintaj 119 jaroj fariĝis vivanta lingvo de komunumo, konsistanta el multaj diversaj nacianoj. Ĉiu aŭdis pri ĝi, tiu ĉi lingvo estas

Esperanto. Multaj prononcas ĝian nomon kun ironio, malrespekto. Aŭskultante tian opinion, mi ĉiam scias, ke la opinianto eĉ unu minuton ne okupiĝis pri ĝi. Ĉar persono, kiu faris tion, ne permesas al si tian deklaron, tiu ĉiam eldiras ĉi tiun vorton kun respekto. Pro kio do? Tial, ke tiu ĉi lingvo estas fakte admirinda kreaĵo. Tiomgrade ĝi estas artefarita, ke ĝi fariĝis ne artefarita. Ĝia vortaro konsistas el vortoj grandparte jam internaciiĝintaj de vivantaj lingvoj. Sed lingvo estas pli ol vortaro, ĝi estas ankaŭ gramatiko. Ĉu iu povus imagi, ke ĝia gramatiko, ne havanta esceptojn, bezonas nur kvar-kvin paĝojn?

Kaj krom tio, ĝi posedas mirindan afiksaron, per kiu oni povas senerare krei meznombre la kvin- sesoblon de la lernitaj vortradikoj. El tio sekvas, ke ĝia alproprigo bezonas tiomoble malpli da tempo, kio certe ne estas la lasta konsiderindaĵo.

Neniu opiniu, ke ĝenerala disvastiĝo de E-o malhelpos la nuntempan multlingvecon. Kontraŭe, ĝi estigos veran protekton al la naciaj, etnaj lingvoj, ĉar ĉi-kaze ĉiu „devige" alproprigos nur du lingvojn: la gepatran, kiun li uzas en sia ĉirkaŭaĵo, kaj la internacian, per kiu li povos komunikiĝi trans la lingvolimo. Kaj se iu deziros pli detale konatiĝi kun la kulturo de iu etno, en tiu okazo li povos, kompreneble, ellerni la propran lingvon de la koncerna popolo.

Nuntempe rekte en E-o kreas nombro da elstaraj verkistoj kaj poetoj, la esperantistoj ĉiujare havas internacian kongreson (la ĉi-jara 92-a okazos en Japanio), ili havas multajn aranĝaĵojn, diversspecajn utilajn revuojn. En interreto, se iu tajpas la vorton „esperanto", li povas tuj konstati, ke ĉio supre dirita ne estas senenhava babilaĵo. Pluraj verkistoj, sciencistoj parolis kaj parolas pri ĝi kun sincera admiro.

Kial oni ne uzas ĝin internacie multe pli vaste? Malgraŭ ke Unesko apogis ĝin jam en la jaro 1954 kaj en 1985 konfirmis sian pozitivan opinion, la lingvon ĉirkaŭas relative granda silento. Kial? Parte pro tio, ke la E-movado ne disponas pri necesaj monrimedoj, parte – kaj miaopinie ĉefe –, pro tio, ke ĝi estas revolucia solvo, kiu kontraŭiras la tradicion de jarmiloj, kaj precipe la politikon de la grandpotencoj, kiuj strebas al supernacia regado. Hitler kaj Stalin tutcerte ne hazarde malpermesis ĝian uzadon, persekutis kaj deportis ĝiajn adeptojn. Kvankam hodiaŭ tio ĉi estas konsiderata kiel merito de E-o kaj ne kiel hontindaĵo, tamen, kiom da homoj scias pri tio? Kaj ĉu vi meditis pri tio, kiom oni povus ŝpari en la buĝeto de la mondo; kaj kiel grandan paŝon ĝi signifus antaŭen en la firmigo de reciproka konfido de popoloj? Kiu sekvas la vojon de sobra

logiko, tiu ne povas neglekti la favoran eblecon, eĉ, tiu devas ekpaŝi kiel eble plej baldaŭ, ĉar la tempo pasas rapide.
Antaŭ ol fini ankoraŭ unu grava rimarkigo. Iuj opinias, ke subita pozitiva decido estus kontraŭ la intereso de multaj homoj. Por trankviligi ilin mi mencias, ke eĉ okaze de unuanima akcepto, la decido ne estos tuj oficialigita, ja la edukaj sistemoj de ĉiuj landoj devos sin prepari kaj, krome, nur konstanta, celkonscia, laŭbezona aktiva uzado igos la lingvon plentaŭga sur ĉiuj kampoj de la vivo. Dum kelkaj sekvontaj jardekoj ĝi estos nur unu el la lingvoj de la nuna sistemo. La enkonduko sendube alportos sukceson, pluraj internaciaj eksperimentoj jam pruvis tion.

Géza Kurucz (Hungario)

Alain Delmotte – Arlette Plutniak:

Artoŝoko en Louvain-la-Neuve, Belgio

Dum tri semajnfinoj, en novembro kaj decembro 2006 kaj januaro 2007, Katalin Kováts gvidis E-kurson por progresantoj bazitan sur la vivo kaj verkoj de Vincent Van Gogh, fama nederlanda pentristo. Pri la organizo zorgis Kvinfolio, la E-grupo de Ottignies-Louvain-la-Neuve.

Estis la tria fojo, ke *Katalin Kováts* okazigis tian kurson, post Pluezek en Bretonio kaj dum NASK 2006 en Usono. En la nuna grupo troviĝis tri personoj, kiuj partoprenis jam unu el la unuaj du kursoj. Ili denove emis artoŝokumi.
„Artoŝoko" ne estas tradicia kurso, ĝi estas speciala lingvokurso, kadre de kiu ekzercante la lingvon la partoprenantoj povas lerni novajn aferojn ekz. pri arto, natursciencoj, historio, malsanoj, vivo kaj ankaŭ pri si mem. *Katalin* proponis multnombrajn lernosituaciojn, kiuj permesis al ni (studentoj) laŭgrade eniri la tri grandajn periodojn de la vivo de *Vincent van Gogh*.
Unue ni travivis kun li la malfacilajn periodojn de la komenco de liaj vivo kaj pentrista kariero. Poste ni sekvis lin tra Parizo al Arles, en la flavan domon. Ni renkontis lian amikon *Paul Gaughin*, "partoprenis" la proceson okazigitan kontraŭ Vincent laŭ peticio de la loĝantaro de Arles; ni eniris lian frenezecon, liajn suferojn ĝis la enhospitaligo en St-Rémy. Tie ni denove konatiĝis kun la amikoj kaj vivlokoj tra la diversaj portretoj kaj pejzaĝoj. Fine ni revenis kun *Vincent* al la pariza regiono. En Auvers-sur-

Oise ni konatiĝis kun la fama *Doktoro Gachet*, kun *Adeline Ravoux*, filino de la gastejestro, ni retrovis la fraton Theo, kiu fariĝis nia intima amiko tra korespondado kun *Vincent*. Ni travivis emociegan momenton pri la tragika morto de *Vincent* antaŭ lia lasta memportreto kaj lumigita kandelo.
Se nun la vivo kaj verkaro de *Van Gogh* ŝajnas al ni tre proksima, estas pro la fakto, ke *Katalin* sukcesis starigi vivantajn situaciojn de lernado: ni ludis kun la diversaj portretoj, ni komparis ilin, rekomponis ilin, ni surscenigis plurajn emociajn momentojn de la vivo de *Vincent*, ni rolludis, deklamis, dancis…

Ni ne havis tempon enui! La ĉefa celo estis paroli, esprimi nin diversmaniere: rakonte, raporte, teatre, lude, diskute ktp. Tiu kurso estis ankaŭ riĉa pro diverseco de materialoj: abundo de afiŝoj, bildoj, de diversaj objektoj. Estis ankaŭ filmoj pri *Vincent* kaj filmoj pri la agadoj dum la kurso mem. Estas tre malfacile detale priskribi tiun riĉan kurson, ni povas nur konsili al ĉiuj partopreni alian „Artoŝokon".



Inter la kursosesioj ni havis ankaŭ libervolajn hejmtaskojn; pretigi prezentojn, ekspoziciojn, legi, traduki tekstojn. La kurso postulis de la studentoj iom mem investi en la agadojn kaj iom transiri personajn singardajn reagojn, pro tio alia postulo estas akcepti, ke oni faras erarojn, ke oni ne tuj kapablas ludi rolon, ke oni ne estas la plej bona, ktp. Tio estis problemo por kelkaj, problemo, kiun ĝenerale oni ne havas dum tradicia kurso. La kurson aktive partoprenis pluraj instruistoj de E-o, kiuj ĉerpis multajn ideojn el la utiligitaj ekzercoj kaj aktivaĵoj.

Nur amant(in)o de *Van Gogh* kapablas krei tian kurson; tio postulas profundan konon de la vivo de la artisto, ne nur datojn sed ankaŭ la kialojn kaj klarigojn pri la okazintaĵoj. Tio bezonis ankaŭ tre bonan konon de la verkoj de la artisto, multe da preparlaboro kaj ankaŭ investo. (Multajn materialojn de la kurso oni povas trovi en la plej granda reta Galerio de *Van Gogh*[9], kiu havas ankaŭ E-version.)

La konoj ne mankis ĉe *Katalin*, kiu post infektiĝo dum junaĝo leginte libron pri la vivo de *Van Gogh* - verkitan de *Irving Stone* - trovis bonan manieron kunplekti la kulturajn valoraĵojn kaj la lingvoinstruadon. Aldonu la bone konatan entuziasmon de *Katalin* kaj vi komprenos, ke eĉ se vi ne aparte ŝatis *Van Gogh*, vi plene partoprenas la kurson kaj ke je la fino viaj opinio kaj sentoj pri la artisto kaj liaj verkoj certe transformiĝas.

La kursoserion partoprenis dek tri personoj el Francio kaj Belgio, kaj el Valonio kaj el Flandrio. La franca ne estis ĉies lingvo; tiel E-o estis la komuna lingvo kaj ĉiuj parolis nur Esperante, krokodiladeto estis nur tre tre malofta.

La niveloj de la studentoj ne estis egalaj, tamen, eĉ se iuj havis kelkajn problemojn kaj estis malpli rapidaj ol la aliaj, tio ne tro ĝenis kaj ĉiu, certe, sufiĉe ricevis por plibonigi sian konon de la lingvo. Plie *Katalin* atente zorgis, ke neniu estu forpuŝita kaj ne restu ekster la agadoj.
Denove dankegon al nia bonega pedagogino *Katalin*, kiu dediĉis multe da tempo en la preparo de tiu mirinda staĝo kaj ebligis al ni aliron al arto per E-o.

[9] *http://www.vggallery.com*

Gajnu someran feriaron en la koro de Germanio[10]

Jen nia propono – gajnu lokon en la dua Somera Arbara Lernejo (SALO2). Tiu estas speciala feria renkontiĝo por infanoj kiuj parolas E-on, plejparte venantaj el lernejoj en partner-urboj de Herzberg. La aranĝo estas organizita apud la E-urbo Herzberg-am-Harz. Tiu urbeto estas ĉirkaŭata de arbaroj kaj la montaro Harz. Serĉu ĝin sur mapo. Sud-oriente de Hanovro, sud-okcidente de Magdeburg kaj Berlino, nord-oriente de Göttingen kaj Kassel kaj sud-okcidente de Leipzig. Herzberg havas kelkajn partnerurbojn en aliaj eŭropaj landoj. Multaj eŭropaj urboj havas ĝemel-urbojn. Sed la homa kaj kultura interŝanĝo inter tiuj malsam-landanoj tuj renkontas obstaklon – lingvo-baron. Jen perfekta ŝanco por e-istoj. Tiun ideon sekvas la E-Centro en Herzberg. Tiu urbo havas oficialan ĝemelan rilaton kun Góra (pron. Gura) en okcidenta Pollando (serĉu ankaŭ tion sur mapo!). En Herzbergaj lernejoj oni instruas E-on, same en lernejoj en Gora. Jam en la pasintjara unua SALO, infanoj el tiuj du urboj renkontis unu la alian kaj bone amikiĝis. Krome, lernantoj el Hungario partoprenis. Ĉi-jare partoprenos infanoj el Herzberg kaj Gora, kune kun grupo eble el Kroatio. Povos aldoniĝi pliaj – kaj ankaŭ vi – se vi kuraĝos partopreni la konkurson!

Dato kaj programo: La aranĝo daŭros du semajnojn: de la 28-a de julio ĝis la 11-a de aŭgusto. En la programo okazos ekskursoj, naĝado, konkursoj, ludoj, sportoj kaj multe pli. Foto de la lasta SALO1 aperis sur la kovrilo de la januara numero de Revuo Esperanto.

Bildoj de la loko, kie okazos SALO-2 estas rigardeblaj en la reto ĉe *http://www.fotos.web.de/interkultura-centro/SALO_2_Sieber_Herzberg*.

Legu pri Herzberg kaj ĝia E-centro ĉe *http://www.ic-herzberg.de*.

La premioj (ili estas donacitaj de la E-Centro):

- Unua premio: 6-taga senkotiza junula partopreno en SALO 2.
- Dua premio: 3-taga senkotiza junula partopreno en SALO2.

Aĝlimoj: 11-17. Akompananta plenkreskulo estos bezonata por junaj gajnontoj. La premio inkluzivas tranoktadon, programon kaj tri manĝojn tage. Ne inkluzivitaj estas vojaĝ-kostoj kaj asekuro – kiun oni nepre akiru. Ni invitas akompanant(in)on aliĝi al la gvida teamo – la Centro ofertas bonetosan kunlaboremon kun signifa partopren-rabato.

[10] Teksto prenita el Juna amiko 2007/1

La tasko: 1. Sendu la kaŝfrazon de la kruc-enigmo en JA 2007/1 sur p. 26.
2. Sendu viajn respondojn al la kvin demandoj sur paĝo 5 de JA 2007/1.
3. Sendu verkon kun 400 ĝis 600 vortoj pri unu el la sekvaj temoj:

1) Kial mi volas partopreni en SALO 2.
2) Ŝanĝoj en mia vivo.
3) Maŝinoj – ĉu niaj amikoj aŭ malamikoj?

Juna amiko rezervas la rajton aperigi konkursaĵojn. Ĉiu konkursaĵo kiu atingas akcepteblan nivelon eniros loterion. Familianoj de nia redakcio ne rajtas partopreni.
Ensendo: Sendu vian respondon rete al: <*stefan.macgill@gmail.com*>, kun temlinio "SALO2 Konkurso"; aŭ paperpoŝte al: *Juna amiko, pf. 193, HU-1368 Budapest* – se eble aldonu retadreson per kiu ni povos mesaĝi al vi. Se vi ne ricevas retan konfirmon pri ricevo de via konkursaĵo, sendu protestan ret-mesaĝon. Limdato por alveno de konkursaĵoj: junio 10, 2007. Ni tuj sciigos la gajnintojn per ret-poŝto aŭ letero. La rezultoj aperos ĉe retejo de *Juna amiko* en la biblioteko ĉe *www.lernu.n*et ekde junio 15.

El la landoj kaj sekcioj…

Aŭstrio

Nia planlingva spirita heredaĵo estas konservata en bibliotekoj kaj arkivoj. Ĉi-rilate bedaŭrinde ekzistas multaj problemoj, tro ofte nekonsciataj. Pro tio la *Esperantomuzeo kaj la Kolekto por Planlingvoj de Aŭstria Nacia Biblioteko*, Vieno, aranĝos kun la subteno de UEA internacian kolokvon en E-o je la temo *„Planlingvaj bibliotekoj kaj novaj teknologioj"*.

La kolokvo okazos la 19-an kaj 20-an de oktobro 2007 sub teknike bonaj kondiĉoj en la nova sidejo de la *Esperantomuzeo*, *Palais Mollard, Herrengasse 9, A-1010 Vieno*.
La celo de la kolokvo estas prezenti la ĉefajn problemojn, kiujn frontas diverstipaj planlingvaj bibliotekoj kaj arkivoj kaj kiuj estas solvendaj. La reciproka konatiĝo de la koncernaj respondeculoj, la komuna pridiskuto de la nuntempa rolo de niaj bibliotekoj kaj arkivoj helpu al ni trovi konvenajn vojojn kaj metodojn por starigi kunlaboron kaj interhelpon.

Pliaj informoj ĉe <esperanto@onb.ac.at>

Barato

ILEI „Bebeto" naskiĝis en *Whitefield*, Bangaloro, Suda Barato: reprezentanto de ILEI, s-ro *Venkatesh Reddy*, post kelk-monata penado, sukcese organizis seminarion al instruistoj en Whitefield, la urbeto, kiu antaŭe estis kolonio de britoj. La seminario okazis la 19-an de februaro 2007 en lernejo, *St. Thomas School*, kun partopreno de 19 viglaj instruistoj de diversaj fakoj. Dum la seminario la ĉeestantoj ekkonis la avantaĝojn kaj valorojn de universala lingvo. La partoprenantoj diskutis ankaŭ pri instrumetodoj, kaj pri studkvanto por gelernantoj (speciale por komencantoj). Nia reprezentanto disdonis senpagajn E-lernolibrojn, broŝurojn kaj eĉ vortarojn, krome informis la kolegojn pri la plej gravaj retadresoj de la E-movado. La plej grava, kaj eble ne plene respondebla demando de la ĉeestantoj estis: Kian utilon havas la scipovo de E-o en la diversaj fakoj/terenoj de la instruado? La dua tiuspeca seminario okazos en junio 2007 en *Bangaloro*.

Informis: s-ro Venkatesh Reddy, <esperovr@yahoo.co.in>

Brazilo

El aliĝo-kampanjo 2007 de la brazila sekcio de ILEI jam rezultis 40 membriĝoj venintaj el naŭ brazilaj ŝtatoj. Ĉi-jare aliĝoj kun papera versio de IPR (21) jam superis tiujn de la pasinta jaro (13). Menciindas la fakto, ke 75% de la aliĝoj okazis per interreto, kio montras la klopodon de la sekcio uzi tiun rimedon por ĉeesti la agadon de la disa brazila instruistaro.

Informis: Joseo Tenorjo,
Sekretario kaj provizora sekciestro de ILEI-BR, <tenorjo@hotmail. com>

Ĉinio

La 1-an de marto, 2007, la unuan tagon de la nova semestro, 600 studentoj eniris en kvar E-kursojn de Shenyang-Universitato. La studentoj akiros du studpoentojn se ili sukcese trapasos la ekzamenon. Ili uzas la lernolibron de *Liu Zhengkun* kaj *Song Yunsheng*: „Esperanto-Kurso de La Nova Jarcento". Instruas: s-ino *Wang Wenyu* kaj s-ro *Pan Chengbo*.

Liaoning-provinca E-Asocio volas enkonduki la ekzamenan sistemon de UEA/ILEI por baki kvalifikitajn e-istojn.

Raportis: Wu Guojiang, vicprezidanto de LEA, Fushun Shiyouyichang Yanjiusuo, CN-113008 Fushun Liaoning, Ĉinio

Finnlando

Dum E-kurso en la Popola Instituto de Valamo (23.-27.7.2007) vi povos sperti ĉion, kio plaĉas al vi en lingvokurso: bonan kaj efikan instruadon, amikan kunestadon kaj multflankan libertempan programon. Ĉiutage estos instruado ĉirkaŭ 5 horojn, en diversaj niveloj. Instruistoj: Atilio Orellana Rojas el Nederlando/Argentino kun dua instruisto el Finnlando. Kurso-gvidanto: Tiina Oittinen.

Petu pliajn informojn de E-Asocio de Finnlando Kontaktulo: *Tiina Oittinen, sekretario de EAF,* adreso: *Puutarhakatu 26 A 11, FI-20100 Turku, tel: 02-2305319, <eafsekretario@esperanto.fi>.*

Pliaj informoj ankaŭ de *Carola Antskog, sekciestro de ILEI en Finnlando*, adreso: *Brokärrvägen 89, FI-25700 Kimito, <cantskog@kolumbus.fi>.*

Francio

E-staĝoj okazos en Grezijono de la 7-a de julio ĝis la 18-a de aŭgusto 2007. Legu programon en: *http://gresillon.org/accueil.htm*. Eblas elekti unu aŭ plurajn el la 6 someraj semajnoj. Ĉiu semajno havas kurson en 3 gradoj, instruistoj venas el 8 diversaj landoj. Aldonaj aktivaĵoj: jogo, koruso, masaĝo, teatro, pentrado, dancado. La kastelo havas grandan parkon kaj kampadejon, vi povas promenadi, babili trinkante kafon, simple ripozi kaj ferii. Por ricevi paperan version, skribu al: <*kastelo@gresillon.org*> aŭ al *Kulturdomo de Esperanto, Kastelo Grezijono, FR-49150 Baugé, Francio. Tel: (+33) 241 89 10 34*

Italio

La 27-an de februaro komenciĝis E-kurso en mez-grada lernejo apud Romo, en la scienca mezlernejo "Vito Volterra" de Ciampino. Partoprenas la klaso III C kun 18 gelernantoj, 11 knaboj kaj 7 knabinoj, kune kun la klas-instruistino pri filozofio kaj historio. Gvidas la kurson Filomena Canzano kaj Renato Corsetti, po du horojn, unufoje semajne, dum dek semajnoj. La geknaboj celas renkonti venontan jaron aliajn klasojn en Strasburgo. *Filomena Canzano, <filomena.canzano@ libero.it>*

Litovio

La 7-an de februaro 2007 en Vilna Pedagogia Universitato komenciĝis kurso de Esperanto por komencantoj (kiel libere elektebla studobjekto). Por ĝi registris sin pli ol 40 gestudentoj. La lekcioj daŭros ĝis la fino de la printempa semestro. *Gediminas Degesys*

Pollando

ILEI-Pollando ekhavis sidejon en la centro de Krakovo. Ĝi situas ĉe la Matejko-Placo, apud la Akademio de Belartoj, vidalvide al la Barbakano kaj la Floriana Pordego (kiu malfermas la faman Floriańska-straton). La loko troviĝas je 3-minuta pieddistanco de la Ĉefa Stacidomo.

En la sidejo okazados konsultado por E-instruantoj; gvidataj de spertuloj ĉiusemajnaj konversacioj por komencantaj partoprenantoj de ĉeestaj aŭ interretaj E-kursoj kaj memlernantoj; estraraj kunsidoj kaj diversaj kunvenoj; lingvaj kaj metodikaj kursoj, seminarioj k.a. Baldaŭ ni lanĉos universitatnivelan metodikan kurson, teorian kaj praktikan, laŭ interesa principo! Estas planata funkciigo de informa kaj didaktika biblioteko kun didaktikaj materialoj, ankaŭ de interreta didaktika biblioteko. Informo pri la deĵoroj kaj preciza adreso estas publikigataj en la retpaĝo de ILEI-PL: *http://www.esperanto-reto.org/ilei/index.html*

Maria Majerczak,
Prezidantino de Pola Sekcio de ILEI

Svedio

***Vojaĝo en Esperanto-lando* dum ok sabatoj en Gotenburgo**

Ĝis nun (31 marto) 11 esperantistoj renkontiĝis dum ses sabatoj inter la horoj 11 kaj15. La sepan fojon ni finstudos la interesan lernolibron de Boris Kolker kaj la okan fojon ni estos vizitataj de Maritza Gutiérrez González, ĵurnalisto ĉe Radio Kubo. *Edukado.net* ofte havas proponojn pri korespondado kaj nun nia „Sabata grupo" interŝanĝas leterojn kun la „Merkreda Grupo Kukuo" en Saintes, Francio, proksime de la Atlantika oceano. I.a. ni diskutis la filmon „Nekonvena vero" de Al Gore, kiun filmon kelkaj partoprenantoj en ambaŭ grupoj spektis.

Ni ankaŭ konstatis ke du personoj el la „Merkreda Grupo Kukuo" antaŭe estis radioamatoroj kaj havis kontakton kun svedaj radioamatoroj. Fakte mi rimarkis alian tre interesan fenomenon: kiam ni rakontas pri ni mem kaj pri okazaĵoj en Svedio ni ekkonas unu la alian pli bone kaj ekscias kiajn variajn vivospertojn ni havas.

Eĉ se bedaŭrinde ne multaj el nia grupo partoprenos en la venonta internacia ekzamenado la 17-18-an de majo en Esperanto-Garden kun Mireille Grosjean, Svislando, kiel la ĉefa ekzamenanto, ni lernis multe, ne nur pri la E-lingvo sed ankaŭ pri *Esperanto-lando* aŭ pli ĝuste pri la E-mondo. Ĉiun fojon iu grupano prelegis pri io. Ni ĉiuj tiel servis kiel instruistoj.

Siv Burell, organizanto de la seminaria serio en Gotenburgo

Ekzamenprepara seminariserio en Stokholmo
La internaciaj ekzamenoj de ILEI/UEA estis motivo por la E-grupo „E-o en Väsby" por organizi serion de ekzamenpreparaj seminarioj okazontaj en la Stokholma E-centro dum tri semajnofinoj meze de februaro, marto kaj aprilo. Dek svedaj esperantistoj, kiuj deziras ekzameniĝi dum la sveda E-kongreso en majo 2007, partoprenis en 36 horoj de prelegoj kaj trejnado kiuj estis pli ol ekzamenpreparaj.

En la programo estis prelegoj titolitaj „Homoj kaj ideoj" (*Bertil Nilsson*), „UEA-kongresoj kaj Japanio" (Rune Moln), „La parola lingvo de E-o" (*Christer Lörnemark*), „E-literaturo" (*Leif Nordenstorm*) kaj „E-o en edukado" (*Radojica Petrović*). Du trionojn de la programo okupis lingvo-trejnado gvidata de *Lars Forsman*.

La organizantoj *Kaisa* kaj *Ole Hansen* kaj *Bertil Nilsson* faris bonan kaj dankindan laboron. La ejoj de la Stokholma E-centro, kun meblaro kaj spacaranĝo modifeblaj por diversaj bezonoj, konfirmis sian taŭgecon por klerigaj kaj kulturaj programoj kaj aliaj laborbezonoj.

Radojica Petrovič

Eo-kurso en la Stokholma universitato
La instituto de lingvistiko en la Stokholma universitato denove donos kurson de E-o kaj interlingvistiko dum la studjaro 07/08. (La kurso okazos nur se aliĝos almenaŭ 20 personoj.)
Estos kvar kurseroj: 1. Enkonduko al E-o (7,5 p); 2. Interlingvistiko kaj konstruitaj lingvoj (7,5 p); 3. Profundiĝo en E-o (11 p); 4. Pri la E-movado (4 p). En la eroj 1 kaj 3 ni planas uzi kursojn kaj materialon de *http://lernu.net* kaj ankaŭ librojn, i.a. „Vojaĝo en Esperanto-lando" de *Kolker*.
Unufoje semajne estos ĉeesta instruado dum du horoj. Kursopriskriboj, poentoj kaj notsistemo estos laŭ la bolonja procezo.
Instruos: *Hartmut Traunmüller* (profesoro de lingvistiko), *Sonja Petrovič Lundberg* (lingvistikstudento kaj lernu-teamano) kaj *Hokan Lundberg* (lernu-teamano).
Ĉu ie ekzistas listo de universitatoj en kiuj nun okazas aŭ baldaŭ okazos E-kurso? Estus interese interŝanĝi informojn kaj spertojn.

Hokan Lundberg

Nova instrukompleto de Stano Marček (recenzo)

Marček, Stano (2006): Esperanto per rekta metodo – internacia ilustrita lernolibro. Ilustris: Linda Marčekova. Eldono de la aŭtoro, Martin, 2006. ISBN 80-969581-8-6. 114 paĝoj B5, koloraj kovrilpaĝoj. Didaktikaj helpiloj: Instruaj Bildoj por Rektmetoda Instruado en du formoj: sur 500 kartonaj folioj A5 en du kofretoj kaj en 500 pdf-dosieroj; Aŭdo-Vida Konversacia Kurso por progresantoj, DVD.

La kompleto de novaj instruiloj de *Stano Marček* prezentas kombinon de aŭtoraj spertoj el tradicia rektmetoda instruado de E-o kun modernaj teknikaj helpiloj. La libroforma prezento de lernmaterialo por komencantoj estas dividita en 22 lecionoj plus vortaro, listo de elektronikaj fontoj por lerni pli pri E-o, enhavtabelo, ilustrita alfabeto kaj ilustrita listo de prepozicioj. Ĉiu leciono komenciĝas per prezento de nova gramatika kaj leksika materialo en formo de ekzemplaj frazoj ilustritaj per adekvataj bildoj, daŭras per ekzemplaj tekstoj – konversacioj, priskriboj aŭ rakontetoj – kaj finiĝas per plifirmigaj ekzercoj diverstipaj. Bildstriecaj ilustraĵoj rande de la paĝo celas plifaciligi alproprigadon de la prezentita lingva materialo. La lecionoj estas pli-malpli ligitaj al elektitaj temoj, ekzemple sinprezentado, familio, homa korpo, sezonoj. La vortprovizo estas elektita laŭ la kriterio de ofteco. La gramatikaĵoj estas traktataj laŭŝtupe, de pli facilaj al malpli simplaj. La 500-folia bildkompleto helpas diversigon kaj maltedigon de la prezentomanieroj inkluzive de perkomputila projekciado sur granda ekrano. La DVD-kurso por progresantoj prezentas abundon da paroliga lernmaterialo en formo de bildoj, sondosieroj kaj elektronikaj tekstlibretoj.

Malgraŭ apliko de moderna lernteknologio, la instrumetodo de *Stano Marček* restas stereotipa laŭ la lingva enhavo kaj didaktika orientiĝo. Per elekto de temoj kaj konstruo de ekzemplaj frazoj kaj tekstoj, la lernolibro por komencantoj estas klare orientita al lingvolernado por si mem, anstataŭ al komunika kapabligado de la lernantoj. La frazoj kiaj estas, ekzemple: „Mi havas bonajn gepatrojn. Avo kaj avino estas geavoj." aŭ: „Ĉiu homo havas kapon. Neniu homo povas vivi sen la kapo." (la tuta tekstaro en la lernolibro estas tiustila, krom kelkaj proverboj, fabeloj kaj aliaj literaturaĵoj) donas trafajn modelojn de korekta uzo de lernataj lingvoelementoj, tamen povas esti tedaj pro sia sterileco kaj malmotivigaj por la lernantoj. Mankas aŭtentaj situacioj kaj ekzemploj de lingvouzado en la reala vivo. La instruiloj de *Stano* kaj *Linda Marček* rekomendas sin per alta teknika

kvalito, profesieca aspekto, riĉa enhavo kaj konsekvenca apliko de rafinita lingvodidaktika procedo. Lerta instruisto uzanta ilin devus tamen scipovi vigligi la lecionojn per pli aŭtentaj enhavoj kaj taskoj el la reala vivo en kaj ekster la E-komunumo.

La instrukompleto estis unue publikigita en la slovaka lingvo kaj poste aperis la internacia eldono. La aŭtoro lanĉis projekton por ĝia adaptado al diversaj nacilingvaj celgrupoj kaj plua disvastigado. Sendube subteninda projekto. *Radojica Petroviĉ*

La 40-a Konferenco de ILEI, 11 – 19 aŭgusto 2007, Ranzan (Japanio)

VIRINOJ EN ESPERANTO-KULTURO



Jen unika ebleco pli longe aktive esperantumi en kongreslando! Se vi fieras pri viaj lando, lingvo kaj kulturo, kaj ŝatus prezenti ĝin al samideanoj, partoprenu la 40-an ILEI-konferencon kaj ĝian *Lingvan Festivalon*! Ĉu vin tedas longaj debatoj laŭ la sama temo? – ni proponas unutagan simpozion laŭ konferenca temo, la 12-an de aŭgusto, sekvan tagon post UK nur 90 km-ojn for de Jokohamo! Pri la simpozio kunlaboras: *ILEI, Japana ILEI-sekcio, Japana E-Instituto, Ŝtata Eduk-Centro por Virinoj* [vd. la foton supre!]*, Municipo de urbo Ranzan*.

De subteno al Esperanto de *Klara Zamenhof*, de instrua agado de *Lidja Zamenhof*, de fervora kontribuo de *Hasegawa Teru* tra versoj kaj prozo de

Marjorie Boulton kaj *Clelia Contemo Guglielminetti* ĝis la literatura agado de niaj samtempulinoj *Lina Gabrielli, Zora Heide* kaj nun aktivaj literaturaj plumoj kiaj estas *Anna Lowenstein* kaj *Lena Karpunina*, virinoj vivtenas la E-literaturon jen plenajn 120 jarojn. Kaj ĝuste la literaturo estas tiu aspekto de la E-kulturo, kiu flegis la lingvon kaj helpis ke ĝi havu tiun lokon kiun ĝi nun okupas. Kial E-poetino *Marie Hankel* havas sian straton en Dresden en Germanio kaj neniu alia poetino akiris tion? Kion kontribuis virinoj al E-teatro kaj muziko? ***Spomenka Štimec***, unu el la plej elstaraj stilistoj de E-literaturo, enkondukos nin en la mondon de la virinoj en E-kulturo kaj invitas nin kunpensi pri la virinoj kaj E-o. Pli vaste la temon traktos ***Kanda Miĉiko*** – la direktorino de Ŝtata Eduk-Centro por Virinoj, kiu gastigos nian konferencon kaj ties Simpozion.

La Lingvan Festivalon en Ranzan ĉi-foje reĝisoras tre kompetenta persono. Pluraj ŝatantoj de tiuj festoj de lingvoj kaj kulturoj bone konas la nomon – ***Dennis Keefe***. Li komencis novan eraon de la festivaloj en Esperantio kaj prave estas titolata „patro de la Lingvaj Festivaloj".

Kiel lastjare en Parma, ni prezentos niajn lingvojn dum mallongaj kursetoj kiuj daŭros nur 25-30 minutojn. Vi povos prezenti vian lingvon dum la konferenco laŭ la maniero kiun vi preferas.

Kiel en antaŭaj ILEI-Konferencoj, ni utiligos parton de la posttagmezo por la Lingva Festivalo. Vi povas nun enskribiĝi por prezenti la lingvon de via lando, sendante mesaĝon al *Dennis Keefe* ĉe <*keefe@linguafest.info*> aŭ indiki tiun deziron plenigante Vian aliĝilon. Vi bezonas nur doni vian nomon, kaj la nomon de la lingvo kiun vi volas prezenti. Se vi neniam partoprenis en Lingva Festivalo, ne zorgu ĉar ni donos al vi mallongan trejnadon en la unua parto de la ILEI-Konferenco, kaj vi havos tempon por prepari la prezentadon de via lingvo. Lastjare ni havis 18 lingvojn, kaj pli da instruantoj ĉar kelkaj kursetoj havis du, eĉ tri prezentantojn.

Post kiam ni ricevos vian mesaĝon por prezenti vian lingvon, ni metos vian nomon kaj lingvon en la horaro de la Festivalo kiun vi povas rigardi ĉe *www.linguafest.info/ranzan/horaro.htm*.

Por partopreni Lingvan Festivalon ne necesas aparte aliĝi — sufiĉas mencii la lingvon, kiun Vi prezentos en Via aliĝilo kaj pretigi gajan prezenton. Serĉu pliajn informojn pri la konferenco kaj Vi ekscios pri pliaj allogaj programeroj dum la tuta konferenco.

Japanio de proksime – ĝia kulturo malfermiĝos tuj antaŭ Viaj okuloj!



Kolegeca etoso en intima rondo
Kulturaj kaj ekskursaj programoj
Variaj kaj instigaj prelegoj
E-kursoj kaj vesperaj aranĝoj
Festivalo de lingvoj kaj kulturoj
Simpozio pri la konferenca temo
Konatiĝo kun la mondo de edukado
Plibonigo de viaj instrukapabloj
Moderkosta loĝigo kaj abunda programo

Praktikaj informoj

Por tiuj, kiuj jam aliĝis/os al la 40-a ILEI konferenco en Ranzan:

1. La Ŝtat Eduk-Centro por Virinoj en ĉambroj donas nur litotukojn, sed ne bantukojn, do bonvolu alporti ilin.
2. La Centro samtempe okazigos ankaŭ aliajn aranĝojn, pro tio ĉiuj estas petataj kiel eble plej baldaŭ aliĝi kaj mendi tranokton, ĉar povas okazi, ke mankos loko por tranokti en la Centro kaj Vi devos serĉi lokon en hotelo, kiu certe multe pli kostos.
3. Se necesos, la Centro povas ŝanĝi niajn ĉambrojn post la unua (labora) parto de la konferenco.
4. Ĉiuj seminariejoj de la Centro post la 21-a horo estos fermitaj, do ni povos daŭrigi niajn tagajn diskutojn ĉu en la sidĉambro, ĉu en la freŝa aero aŭ gaje pasigi tempon kun geamikoj en apuda parko.
5. Dum ekskursaj tagoj ne eblas mendi manĝojn ankaŭ por tiuj, kiuj ne ekskursas. Tiuj, kiuj restos en la Centro, mem devos zorgi pri manĝoj, mendi ilin en la Centro aŭ ie apude.

Informoj pri la konferenco, ĝia programo, urbo, partoprenkondiĉoj en *http://www.ilei.info/novajxoj/Ranzan.php*

Reta aliĝilo en *http://www.ilei.info/konferenco/alighilo2007.php*.

Se vi havas demandojn proponojn aŭ komentojn – serĉu virinon: Vi ĉiam estas bonvena skribi al:

Aida Čižikaitė, <aidute@mail.lt> (ILEI-estrarano pri konferencoj) kaj *Tieko Isikawa, <isksanjo@ff.e-mansion.com>* (loka ĉeforganizanto).

La 41-a Konferenco de ILEI

Benino, Portonovo, 2008

INSTRUISTOJ DE ESPERANTO POR LA PLANEDO TERO

La urbo. La nomo *Portonovo* certe sonas kutime por esperantistoj, kvankam ĝi originis el la portugala lingvo kiam la portugalo *Eucharistus de Campos,* dum sia esplorvojaĝo en 1730, rimarkis, ke la tiama urbo ege similas al la urbo Porto de Portugalio. La nomo tiel restis eĉ dum kaj post la franca influo. Tamen la multnombra loĝantaro de Portonovo ne ofte uzas la portugalan devenvorton, sed *Hogbonu* kaj *Aĝaĉe* laŭ la lingvoj *gun* kaj *joruba* respektive. Portonovo estas oficiale la ĉefurbo de Benino. Ĝi gastigas la parlamenton kaj kelkajn aliajn ŝtatadministrejojn. Ĝi situas apud la giganta lago *Aheme*, kiun enfluas la riverego *Oueme*. Ĉirkaŭ 30 km-ojn for de *Portonovo* situas *Cotonou*, en Benino la plej granda kaj ekonomie grava urbo kun flughaveno, facile atingebla el la konferencurbo. Portonovo estas ankaŭ transirurbo al la giganta Niĝerio. Estas preskaŭ neeble ne rimarki la ekziston de la praktiko de *voduo*, kiam oni promenas en la urbo de Portonovo. *Voduo* estas religio por iuj, sed tradicia vivmaniero por aliaj.

Loĝado. Portonovo disponigas ĉiuspecajn hotelojn kaj gastejojn sufiĉe taŭgajn ĉu por eŭropanoj ĉu por afrikanoj, laŭ iliaj buĝetoj. Averaĝa kosto de unulita ĉambro por nokto ĉe sufiĉe luksa hotelo estas 19 000 FCFA (30 EUR) kaj 13 000 FCFA (19 EUR) por mezluksa hotelo (1 EUR = 655 FCFA).

Restoracioj. Kiel kutime en multaj afrikaj urboj, en Portonovo eblas restoraciumi eŭropece, aŭ gustumi afrikajn manĝaĵojn en restoracioj kaj ĉe multnombraj afrikaj manĝejoj relative malaltkoste: ĉirkaŭ 8 000 FCFA (12,5 EUR) tage.

Pliaj informoj. Por kontentigi bezonoj de niaj geamikoj el Afriko, ni ĉiuj devos streĉigi niaj fortojn kaj klopodi organizi kelkajn seminariojn, specialajn kaj lingvajn kursojn, organizi seriojn de prelegoj, kiuj similu al Somera Universitato en multaj E-aranĝoj. Por partoprenantoj el aliaj kontinentoj, ni strebos aranĝi kulturan kaj ekskursan programon. Priskribo de la programo kaj pli konkretaj priskriboj pri la konferenco aperos en venontjaraj IPR kaj retejo de ILEI *www.ilei.info*. Pli precizaj detaloj kaj aliĝilo aperos en flugfolio dum la konferenco en Japanio, Ranzan, 11-19 de aŭgusto 2007, kiun partopreni Vi estas bonvenaj. Se Vi havas proponojn, sugestojn, dezirojn, demandojn, bonvolu skribi al: <*info@ilei.info*> aŭ

<*aidute@mail.lt*>, aŭ al Afrika Oficejo de UEA <*afrika.oficejo@uea.org*>. Financa helpo por subvencii partoprenon de kiom eble pli da instruistoj kaj junaj instruemuloj el Afriko bonvenas al la konto ilek-a (ILEI) aŭ al la Afrika Fondaĵo ĉe UEA, kun indiko „Benino 2008“.

Organizantoj

ILEI-KONFERENCO EN VIA LANDO!

Kie ni konferencos en 2009? - dependas de Vi!

ILEI-konferenco povos okazi en via lando, en via urbo, en via klubo! La estraro alvokas vin al konkurso: Lanĉu la ideon en vialanda instruista rondo kaj ĝuu la konferencon ĉehejme! – ŝparu monon por sekvajara pli longa restado en Esperantujo! Estas multaj landaj sekcioj de ILEI, kiuj povus ne nur inviti, sed ankaŭ forte konkurenci por aranĝi ILEI-konferencon en 2009. Multaj E-aranĝoj estas planataj anticipe kaj informoj pri ili aperas sufiĉe frue. UK en 2008 okazos en Rotterdam la 19-25-an de julio. Por 2009 jam estas kandidatoj. Ankaŭ TEJO jam lanĉis konkurson por IJK en 2008. En 2007 ni konferencos en Ranzan la 11-19-an de aŭg. tuj post la UK (informoj ĉe *http://www.ilei.info/novajxoj/Ranzan.php*). En 2008 ni konferencos en Porto Novo (Benino) fine de julio, komence de aŭgusto, same tuj post la UK (Varbilo ĉe *http://www.ilei.info/novajxoj/41a_konf_Afriko.pdf*, pliaj informoj aperos poste en IPR kaj retpaĝo de ILEI). Post Azio kaj Afriko indus esplori aliajn mondopartojn. Ĉu en via lando la instruistoj kaj instruemuloj estas aktivaj? Ĉu en via urbo estas vigla grupo de e-istoj, kiuj ŝatas organizi kaj gastigi internacian aranĝon? Ĉu vi volas konvinki la lokan medion pri la utilo de la internacia lingvo? – jen la kialoj por inviti ILEI-konferencon! Bv. sendi vian proponon ĝis la 30-a de majo 2007 al la estrarano pri konf-oj: *Aida Čižikaitė, Kapinių 11-15, LT-50189 Kaunas, Litovio. Tel.: +370/37793408, poŝtel. +370/616 15991, rete: <aidute@ mail.lt>*. La estraro esploros vian proponon kaj informos pri la decido ĝis la fino de junio 2007. Por priskribi la proponon, bv. uzi informilojn, kiuj aperas en IPR aŭ retpaĝo de ILEI (*www.ilei.info*) kaj nepre konsultu la Konferencan regularon: *http://www.ilei.info/dok/regularo_ konferencoj.rtf.* La celo estas sufiĉe frue anonci pri la elektitaj loko kaj dato por tre bone pretigi la konferencon, por allogi kiel eble plej multe da partoprenontoj, por fari nian konferencon tre ŝatata kaj prestiĝa E-aranĝo al kiu venu ne nur instruistoj kaj instruantoj, sed ĉiuj lingvemuloj.

Atendante viajn proponojn: *La estraro de ILEI*

LABORKOMISIONOJ
Ekzamena: Probal Dasgupta (prez.), Boris Grigorjevič Kolker (vicprez.), Reza Torabi (sekr.), Mireille Grosjean, Julián Hernández, Jorge Antonio Leoni de León, Oliver Mazodze
Elekta: Tieko Isikawa, Ana Montesinos de Gomis, Aurora Bute
Kontrola: Ulla Luin, Bengt Jonsson, Marianne Westman
Lerneja: Carola Antskog, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Tieko Isikawa, Luigia Madella, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi
Regulara: Marija Belošević, Rob Moerbeek, Atilio Orellana Rojas
Terminara: Maŭro La Torre, Miroslav Malovec

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ
EEU: Eŭropa Esperanto-Unio. Komisiito pri instruado kaj rilatoj kun ILEI: Carola Antskog, Brokärrvägen 89, FI-25700 Kimito, Finnlando, cantskog@kolumbus.fi
E@I (Esperanto ĉe Interreto, www.ikso.net): faka sekcio de TEJO (www.tejo.org, poŝtadreso ĉe UEA).
FIPLV (Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj): Reprezentanto de ILEI: Jennifer Bishop, esperanto@Education.monash.edu.au
IEI: Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando.
TEJO: Observanto de TEJO ĉe ILEI: François Hounsounou (adr. sur p. 40., Benino).
UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. www.uea.org. Observanto de ILEI ĉe UEA: Radojica Petrović. A-komitatano el ILEI: Atilio Orellana Rojas. Observanto de UEA ĉe ILEI: Claude Nourmont. Reprezentanto de ILEI en la Afrika Komisiono de UEA: François Hounsounou
UNESKO (en operaciaj rilatoj). Reprezentantoj de ILEI: François Lo Jacomo, 72, quai de la Loire, FR-75019 Paris, francois.lojacomo@wanadoo.fr; Monique Arnaud, Ecole Chemin de l' Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et Charbillac, monique.arnaud@tiscali.fr; Jean-Pierre Boulet, 17 Av. de la Dordogne, FR-63800 Cournon d'Auvergne, tel.: (+33) 4 73 84 90 60; Mireille Grosjean, Temple 20 pf. 9, CH-2416 Les Brenets, tel/fakso: (+41 32) 932 18 88, mireille.grosjean@rpn.ch

MEMBRIĜO AL ILEI KAJ PAGADO POR ALIAJ SERVOJ

Membreco kostas 18 EUR en A-landoj (laŭ UEA-difino) kaj 9 EUR en B-landoj, kun ricevo de 4 numeroj de IPR jare. Kun aliro nur al reta versio, membreco kostas 4 EUR (A) kaj 2 EUR (B). Bonvenaj estas donacoj al la fondaĵoj de ILEI, konferencaj pagoj kaj abonoj por Juna amiko. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas membrigojn kaj donacojn; simile, perantoj por Juna amiko akceptas abonojn enlande. Por pagoj rekte al la internacia ILEI informu skribe al la kasisto de ILEI: Sjoerd Bosga, Tråddragargatan 27D, SE-723 37 Västerås, Svedio. Tel.: (+46 21) 41 70 45, sjoerd@esperanto.se.

La pagoj povas okazi pere de konto de ILEI ĉe UEA, aŭ al la sveda konto.

* Pagoj al konto de ILEI ĉe UEA: Pri pagmanieroj vidu informojn en la Jarlibro de UEA. Atentu pri aldono de sumo por bankkostoj. Indiku vian nomon kaj landon, mallonge la celon de la pago, kaj unu el la tri kontoj ilek-a (ĝenerala), juna-l (Juna amiko), pike-b (projekto Interkulturo).

* Pagoj al la sveda bankkonto: El Svedio pagu al konto 8327-9, 994 515 014-3 ĉe Föreningssparbanken. El aliaj landoj pagu al IBAN SE56 8000 0832 7999 4515 0143 kun BIC/SWIFT kodo SWEDSESS. Aldonu 6 eŭrojn por svedaj bankkostoj se vi pagas el ekster Eŭropa Unio.

* Simpla abono de IPR sen membreco: 18 EUR. Reklamtarifoj por IPR: 180 EUR por plena, 110 EUR por duona kaj 70 por kvarona paĝoj. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon: kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag sub numero 27.181.064.

Hejmpaĝo de ILEI: http://www.ilei.info

REDAKCIAJ INFORMOJ

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Iwona KOCIĘBA, Graaf de Fiennesln 54, BE-2650 Edegem. Presado: Flandra Esperanto Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, tel: (+32-3)-234 34 00.

Redaktejo: NÉMETH József, HU-8531 IHÁSZ, Fő u. 41/5. Rete: <jozefonemeth@yahoo.com>, http://www.ilei.info/ipr/; tel: (+36-89) 356-050. La revuo aperas ankaŭ kasede registrita por leghandikapuloj. Informas: Rob MOERBEEK, Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk, <r.moerbeek@wanadoo.nl>.

La numeron ni sendis al la presejo la 24-an de aprilo 2007, redaktofino por la sekva numero: 31.08.2007.

SEKCIOJ

Albanio: Vasil Pistoli, c/o Bardhyl Selimi, Rr. Maliq Muco, Pall. 50, ap. 3, AL-Tirana,
selimibardhyl@yahoo.com

Aŭstralio: Penny Vos, 14 Candelo St, AU-2550 Candelo NSW,
penivos@yahoo.com

Belgio: Iwona Kocięba, Graaf de Fiennesln 54, BE-2650 Edegem,
iwona.kocieba@telenet.be

Benino: François Hounsounou,
BP 226 BJ-Lokossa-Mono, Rep du Benin, West Afrika,
hounfranc@yahoo.fr

Brazilo: Antonio Felix da Silva
Rua Engenheiro Francisco Azevedo, 243**,** Sumarezinho - São Paulo – SP**,**
BR-05030-010**,** *geinstruistoj@ileibr.org*

Britio: Tellier Angela, 10 Marina Gardens, GB IP11 2HW Felixstowe, Suffolk,
angela@esperantoeducation.co.uk

Ĉeĥio: Jana Melichárková,
CZ-696 02 Ratíškovice 938,
melicharkova@quick.cz

Ĉinio: Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., 29-34 North Part, Huazhong Normal University, CN-430070 Wuhan,
zdchen@public.wh.hb.cn

Danio: Arne Casper-Mortensen, Bryggervangen 70, 4. tv. DK-2100 Kobenhavn, *amecasper@dbmail.dk*

Finnlando: Carola Antskog,
Dragsfjärdvägen 690, FI-25700 Kimito, *cantskog@kolumbus.fi*

Francio: Michel Dechy, 65 allée de la crémaillère,
FR-59650 Villeneuve d'Ascq, *michel_dechy@hotmail.com*

Germanio: Zsófia Kóródy,
Esperanto-Centro, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg/Harz,
zsofia.korody@esperanto.de

Hungario: József Németh,
Fő u. 41/5, HU-8531 Ihász, *jozefo.nemeth@gmail.com*

Irano: Hamzeh Ŝafii, P.O. Kesto 17765-184, IR-Teheran,
ilei.ir@esperanto.org

Italio: Luigia Oberrauch Madella, via Prampolini 8,
IT-43100 Parma, *silkovojo@aliceposta.it*

Japanio: Isikawa Tieko, 103, Tate 1-6-6, Siki, Saitama JP-353-0006,
isksanjo@ff.e-mansion.com

Katalunio: Pedro M. Martin Bututxaga, Arnau Gatell 2-4-2,
ES-17300 Blanes, *ileicat@hotmail.com*

Korea Resp.: CHO Sung Ho, Department of Biology, Inha Universitato,
Incheon KR-402-751, *shcho@inha.ac.kr*

Kroatio/KEL: Marija Jerković, Jarunska 6, HR-10000 Zagreb,
mjerkovic@net.hr

Kroatio/KEU: Ivan Bekavac-Basić, Kuŝlanova 59, HR-10000 Zagreb,
ilei@hes-keu.hr

Kubo: Marta Alonso Gutiérrez, Malecón 659 entre Belascoaín y
Gervasio; CU-10200 Ciudad de La Habana, *kubesp@enet.cu*

Nederlando: Atilio Orellana Rojas, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den
Haag, *iei001@tiscali.nl*

Norvegio: Anne-Karin Bondhus, Baldersveg 3C, nr 17,
NO-7033 Trondheim,
anne.k.bondhus@itk.ntnu.no

Pollando: Maria Majerczak, ul. Armii Krajowej 7, m. 122, PL-30 150
Krakow, *mmajerczak@gmail.com*

Rumanio: Mihai Trifoi,
Str. Principala Bl.1 Ap.3,
RO-527116 Bixad/Jud. Covasna, *trifoi@honoris.ro*

Rusio: Irina Gonĉarova, Moloeznaja 38-10, Odincovo 2, Mosk. obl. RU-
143000, *mirina@online.ru*

Svedio: Siv Burell, Lekstorpsv. 46 E, SE-443 41 Graabo,
s.burell@telia.com

Svislando: Mirelle Grosjean, Grand-rue 9. Pf. 9,
CH-2416 Les Brenets *mireille.grosjean@rpn.ch*

Togolando: Attiogbe-Agbemadon B., Mensah, T. I. E. To, B.P. 13169,
Lome-TOGO, *esp.togo@cafe.tg*

Ukrainio: Nina Daniljuk, prospekt Sobornosti, 32-108, Luck-26, UA-
43026, *nina_daniljuk@ukr.net*

Usono kaj **Kanado:** Doroteo Holland, 5140 San Lorenzo Dr, Santa Barbara, CA 93111-2521 (US), *dorothyh@west.net*

Venezuelo: Andrés Turrisi, Cen.Res.Puerta del Este.Torre, Oeste, piso15, ap.153, Av.Madrid, VE-1070 La California Norte, Caracas, *andesp@internet.ve*

REPREZENTANTOJ

Armenio: Lida Elbakjan, Moldo-vakan 26/2, kv.52, AM-375062 Erevan, *LIDELB@freenet.am*

Barato/Hindujo: Venkatesh Reddy, No. 216, Off main Road, Whitefield, Bangalore 66, Karnataka, *esperovr@yahoo.co.in*

Bosnio kaj Hercegovino: Nimeta Kulenoviĉ, Branica Sarajeva 15/V, BA-71000 Sarajevo

Ĉilio: Héctor Campos Grez, Casilla 903, CL-3340000, *hecg@uea.org*

Estonio: Helgi Hromova, Pk. 623, EE-12602 Tallinn

Islando: Loftur Melberg Sigurjónsson, Traðarberg 13, IS-221 Hafnarfjörður, *loftur@skyrr.is*

Israelo: Gian Piero Savio, 13/4 Menora-str. IL-53490 Givatajim, *saviogp@zahav.net.il*

Kongo DR: Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P.13, CD-Lukala, Bas-Zaïre

Kostariko: Hugo Mora Poltronieri, Apartado 4981, CR-1000 San José, *tikoguau@gmail.com*

Litovio: Algimantas Piliponis, Kavoliuko 3-93, LT-04325 Vilnius, *piliponis@centras.lt*

Meksiko: José de Jesús Corrales C., Belice 116, Fraccionamiento Guadalupe, Durango, Dgo. *jdjcorrales@yahoo.com.mx*

Nov-Zelando: Gwenda Sutton, 12C Herbert Gardens, 186 The Terrace, NZ-6001 Wellington 1, *gwenda.s@ihug.co.nz*

Portugalio: João Jose Santos, Apartado 123, PT-5301-902 Bragança, *joaojosesantos@gmail.com*

Serbio: Radojica Petrović, Bul. oslobodjenja 36, 32000 Ĉaĉak, *radp@ptt.yu*

Slovenio: Marija Zlatnar-Moe, Miliĉinskega 66, SI-1000 Ljubljana, *Marija.Zlatnar@guest.arnes.si*

Uzbekistano: Eugeno S. Perevertajlo, Abon. jashik 140, Poĉtamt, UZ-700000 Taŝkento, CIS, *esperuzo@mail.ru*

SEKCIOJ

Albanio: Vasil Pistoli, c/o Bardhyl Selimi, Rr. Maliq Muco, Pall. 50, ap. 3, AL-Tirana, *selimibardhyl@yahoo.com*

Aŭstralio: Penny Vos, 14 Candelo St, AU-2550 Candelo NSW, *penivos@yahoo.com*

Belgio: Iwona Kocięba, Graaf de Fiennesln 54, BE-2650 Edegem, *iwona.kocieba@telenet.be*

Benino: François Hounsounou, BP 226 BJ-Lokossa-Mono, Rep du Benin, West Afrika, *hounfranc@yahoo.fr*

Brazilo: Antonio Felix da Silva Rua Engenheiro Francisco Azevedo, 243, Sumarezinho - São Paulo – SP, BR-05030-010, *geinstruistoj@ileibr.org*

Britio: Tellier Angela, 10 Marina Gardens, GB IP11 2HW Felixstowe, Suffolk, *angela@esperantoeducation.co.uk*

Ĉeĥio: Jana Melichárková, CZ-696 02 Ratíškovice 938, *melicharkova@quick.cz*

Ĉinio: Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., 29-34 North Part, Huazhong Normal University, CN-430070 Wuhan, *zdchen@public.wh.hb.cn*

Danio: Arne Casper-Mortensen, Bryggervangen 70, 4. tv. DK-2100 Kobenhavn, *arnecasper@dbmail.dk*

Finnlando: Carola Antskog, Dragsfjärdvägen 690, FI-25700 Kimito, *cantskog@kolumbus.fi*

Francio: Michel Dechy, 65 allée de la crémaillère, FR-59650 Villeneuve d'Ascq, *michel_dechy@hotmail.com*

Germanio: Zsófia Kóródy, Esperanto-Centro, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg/Harz, *zsofia.korody@esperanto.de*

Hungario: József Németh, Fő u. 41/5, HU-8531 Ihász, *jozefo.nemeth@gmail.com*

Irano: Hamzeh Šafii, P.O. Kesto 17765-184, IR-Teheran, *ilei.ir@esperanto.org*

Italio: Luigia Oberrauch Madella, via Prampolini 8, IT-43100 Parma, *silkovojo@aliceposta.it*

Japanio: Isikawa Tieko, 103, Tate 1-6-6, Siki, Saitama JP-353-0006, *isksanjo@ff.e-mansion.com*

Katalunio: Pedro M. Martin Bututxaga, Arnau Gatell 2-4-2, ES-17300 Blanes, *ileicat@hotmail.com*

Korea Resp.: CHO Sung Ho, Department of Biology, Inha Universitato, Incheon KR-402-751, *shcho@inha.ac.kr*

Kroatio/KEL: Marija Jerković, Jarunska 6, HR-10000 Zagreb, *mjerkovic@net.hr*

Kroatio/KEU: Ivan Bekavac-Basić, Kušlanova 59, HR-10000 Zagreb, *ilei@hes-keu.hr*

Kubo: Marta Alonso Gutiérrez, Malecón 659 entre Belascoaín y Gervasio; CU-10200 Ciudad de La Habana, *kubesp@enet.cu*

Nederlando: Atilio Orellana Rojas, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, *iei001@tiscali.nl*

Norvegio: Anne-Karin Bondhus, Baldersveg 3C, nr 17, NO-7033 Trondheim, *anne.k.bondhus@itk.ntnu.no*

Pollando: Maria Majerczak, ul. Armii Krajowej 7, m. 122, PL-30 150 Krakow, *mmajerczak@gmail.com*

Rumanio: Mihai Trifoi, Str. Principala Bl.1 Ap.3, RO-527116 Bixad/Jud. Covasna, *trifoi@honoris.ro*

Rusio: Irina Gončarova, Moloeznaja 38-10, Odincovo 2, Mosk. obl. RU-143000, *mirina@online.ru*

Svedio: Siv Burell, Lekstorpsv. 46 E, SE-443 41 Graabo, *s.burell@telia.com*

Svislando: Mirelle Grosjean, Grand-rue 9. Pf. 9, CH-2416 Les Brenets *mireille.grosjean@rpn.ch*

Togolando: Attiogbe-Agbemadon B., Mensah, T. I. E. To, B.P. 13169, Lome-TOGO, *esp.togo@cafe.tg*

Ukrainio: Nina Daniljuk, prospekt Sobornosti, 32-108, Luck-26, UA-43026, *nina_daniljuk@ukr.net*

Usono kaj **Kanado:** Doroteo Holland, 5140 San Lorenzo Dr, Santa Barbara, CA 93111-2521 (US), *dorothyh@west.net*

Venezuelo: Andrés Turrisi, Cen.Res.Puerta del Este.Torre, Oeste, piso15, ap.153, Av.Madrid, VE-1070 La California Norte, Caracas, *andesp@internet.ve*

REPREZENTANTOJ

Armenio: Lida Elbakjan, Moldovakan 26/2, kv.52, AM-375062 Erevan, *LIDELB@freenet.am*

Barato/Hindujo: Venkatesh Reddy, No. 216, Off main Road, Whitefield, Bangalore 66, Karnataka, *esperovr@yahoo.co.in*

Bosnio kaj Hercegovino: Nimeta Kulenović, Branica Sarajeva 15/V, BA-71000 Sarajevo

Ĉilio: Héctor Campos Grez, Casilla 903, CL-3340000, *hecg@uea.org*

Estonio: Helgi Hromova, Pk. 623, EE-12602 Tallinn

Islando: Loftur Melberg Sigurjónsson, Traðarberg 13, IS-221 Hafnarfjörður, *loftur@skyrr.is*

Israelo: Gian Piero Savio, 13/4 Menora-str. IL-53490 Givatajim, *saviogp@zahav.net.il*

Kongo DR: Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P.13, CD-Lukala, Bas-Zaïre

Kostariko: Hugo Mora Poltronieri, Apartado 4981, CR-1000 San José, *tikoguau@gmail.com*

Litovio: Algimantas Piliponis, Kavoliuko 3-93, LT-04325 Vilnius, *piliponis@centras.lt*

Meksiko: José de Jesús Corrales C., Belice 116, Fraccionamiento Guadalupe, Durango, Dgo. *jdjcorrales@yahoo.com.mx*

Nov-Zelando: Gwenda Sutton, 12C Herbert Gardens, 186 The Terrace, NZ-6001 Wellington 1, *gwenda.s@ihug.co.nz*

Portugalio: João Jose Santos, Apartado 123, PT-5301-902 Bragança, *joaojosesantos@gmail.com*

Serbio: Radojica Petrović, Bul. oslobodjenja 36, 32000 Čačak, *radp@ptt.yu*

Slovenio: Marija Zlatnar-Moe, Miličinskega 66, SI-1000 Ljubljana, *Marija.Zlatnar@guest.arnes.si*

Uzbekistano: Eugeno S. Perevertajlo, Abon. jashik 140, Počtamt, UZ-700000 Taškento, CIS, *esperuzo@mail.ru*